

revuo

# esperanto

septembro 1964


57-a jaro

n-ro 706 (9)

universala esperanto - asocio (en konsultaj rilatoj kun U.N.E.S.C.O.)

UNIVERSALA

KONGRESO





# ESPERANTO

## revuo internacia

- enhavo**
- 141 Kongreso de amikeco ĉe la Norda Maro  
Unuaj decidoj de la nova Estraro
  - 142 La festa parolado de prof. Ivo Lapenna
  - 144 Ĉefaj punktoj de la Inaŭguro
  - 145 Laboro de la Komitato kaj Estraro de UEA
  - 146 Ĝeneralaj Kunvenoj kaj Laboraj Sekcioj
  - 147 Internacia Somera Universitato
  - 148 Oficiala teatra vespero  
Libervolaj teatraj vesperoj
  - 150 "Vojaĝantaj Turtoj" (Neto/Knoedt)  
Belartaj Konkursoj 1964: rezultoj
  - 151 Foto-konkurso 1964: rezultoj  
Premio Gevaert: Juhász Miklos
  - 152 Konkursoj: belarta, fota, oratora k.a.
  - 153 Aliaj kongresaj aranĝoj
  - 154 Fino de la 49-a: La Solena Fermo  
Kongresa Rezolucio
  - 155 Margenaj notoj pri la Universala Kongreso
  - 156 Fakaj kaj neneŭtralaj organizaĵoj
  - 157 Mallongaj novaĵoj
  - 158 Esperanto en Radio  
Nekrologoj Podrepschek kaj Gustafson  
Ricevitaj eldonaĵoj
  - 159 Novaj konkursoj pri la 49-a U.K. !  
Oficiala Informilo n-ro 371
  - 160 Anoncetoj
- kovrilo**
- Antila kantistino Milly Scott alportis amerikan elementon al la Distra Vespero (vidu p. 153).  
Fotis: H. Mulder.
- fotoj**
- 144 k.a.: Mulder

**oficiala organo  
de universala  
esperanto-asocio**

esperanto  
septembro  
1964

(En Konsultaj Rilatoj kun U.N.E.S.C.O.)

**Fondinto:** H. Hodler

**Redaktoro:** D-ro V. Sadler

**Cion pri administrado de UEA** kaj de la revuo Esperanto (abonado, reklamoj, manuskriptoj, anoncetoj) sendu al UNIVERSALA ESPE-  
RANTO-ASOCIO, Nieuwe Binnenweg 176,  
Rotterdam-2, Nederlando. Telefono: (010) 3 27 88.  
Girkonto 378964.

**TELEGRAMOJ:** ESPERANTO ROTTERDAM.

**Ciu materialo por difinita numero** devas atingi la Centran Oficejon (vidu supre) antaŭ la 1-a de la antaŭa monato.

**Manuskriptoj** por "Esperanto" estu tajpitaj en 2 ekzempleroj sur unu flanko de la papero kun interlinia spaco kaj tre larĝa margeno.

**Bankisto de U.E.A.:**

R. Mees & Zoonen, Blaak 10, Rotterdam-1.

**Presisto:** Drukkerij Zwagers c.v.

**Traduko kaj represado** de artikoloj, kun escepto de verkoj premiitaj en konkursoj, estas permesitaj, kondiĉe ke oni menciu la fonton.

**Jara abono (1964):** 15,— gld. (kun membreco kaj jarlibro 20,— gld). Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en multaj landoj.

**Tarifo por reklamoj:** ricevebla laŭ peto.

**Anoncetoj pri korespondado:**

0,20 gld por unu vorto aŭ 1 int. respondkupono por ĉiu duo da vortoj.

Tekstoj de anoncetoj kaj reklamoj aperas ekster la respondeco de la Redakcio.

**Legantoj en 84 landoj.**

**Estraro de U.E.A.:**

Prof. d-ro I. Lapenna, prezidanto kaj estrarano pri eksteraj rilatoj, 77 Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo.

S-ro E. L. M. Wensing, vic-prezidanto, Aalsterweg 217, Eindhoven, Nederlando.

S-ro E. Carlén, vic-prezidanto, Yxhult, Hällabrottet, Svedujo.

S-ro G. Becker, ĝenerala sekretario kaj estrarano pri informado kaj kongresoj, 6653 Blieskastel, Schlossbergstr. 51, Germanujo.

D-ro A. Albault, estrarano pri kulturaj aferoj, 32 Avenue Etienne Billières, Toulouse, Francujo.

S-ro M. Jaumotte, estrarano pri landaj kaj fakaj asocioj, 44 De Bruynlaan, Wilrijk-Antwerpen, Belgujo.

S-ro J. Toczyski, estrarano pri lernejoj, skr. p. 57, Gdańsk, Pollando.

S-ro E. J. Woessink, estrarano pri financoj, Vondellaan 47, Arnhem, Nederlando.

Reprezentanto de TEJO ĉe la Estraro de UEA: S-ro H. R. Tonkin, 7 Linnaean Street, Cambridge 38, Mass., Usono.

**Centro de Esploro kaj Dokumentado**

77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo, Telefono: ARNold 90-81.

**Serva Centro:** ĉe J. J. Sturzenegger, Rothstr. 7, Zürich 6/57, Svislando.

## Prof. Lapenna la nova Prezidanto de UEA

Ĉiu kongresano portas al sia hejmo tute propran memorbildon pri la Universala Kongreso. Por iuj elstaras en memoro la kulturaj programeroj: antaŭ ĉio la seso da teatraĵoj realigitaj de Internacia Arta Teatro, kiun plifortigis ankoraŭ la aliĝo de bulgaraj aktoroj. Por aliaj, verŝajne, la plej memorindaj okazaĵoj estos la debatoj de la Komitato kaj la fina publika anonco, en la Solena Fermo, pri Prof. Lapenna kiel nova Prezidanto, kaj pri s-ro Holmes kiel nova Honora Prezidanto. Sed por la plimulto, sendube, restos en memoro tiu miksaĵo el laboro kaj distriĝo, rezolucioj kaj tostoj; amikecoj novaj kaj malnovaj, kiu estas ja tiel karakteriza je la Universalaj Kongresoj. Laŭ la difino de la Kongresa Regularo, "la Universala Kongreso estas internacia manifestacio de la Esperantistaro", kiu "celas fortigi la solidarecon inter la esperantistoj, progresigi la movadon kaj studi ĝiajn problemojn." Tiel larĝan taskon ĝi ne povus plenumi, se ĝia programo estus limigita je tiu aŭ alia aspekto, ĉar same gravas internacia diskuto pri la lingva problemo kiel ankaŭ praktika evidentigo de ĝia solvo por ĉiuj sferoj de la vivo. Ne nur la Universalaj Kongresoj kuncentrigas dum unu semajno jare la plej aktivajn laborantojn por la Internacia Lingvo, sed ili donas unikan eblecon aktori, kanti aŭ oratori en Esperanto antaŭ dumil aŭskultantoj.

Efektive, aliĝis al la 49-a UK entute 2512

personoj. El tiuj, pli granda nombro ol iam de post la dua monda milito venis al okcident-eŭropa lando el orienta Eŭropo. Tio signifas, ke laŭ konsisto la kongreso estis kredeble la plej internacieca de la lastaj dudek jaroj, ĉar oni ne povus diri, ke la plej granda parto de la kongresanoj estis de tiu aŭ alia lando. Ofte aŭdiĝis krome la rimarko, ke la ĝenerala etoso estas eksterordinare varma kaj amikeca. Al tio certe kontribuis la ekvilibro de la naciaj grupoj, kiu preskaŭ tute ekzilis la naciajn lingvojn el la kongresejoj. Eble la solaj okazoj por parolo de nacilingvo estis la vizitoj de la ambasadoroj de Aŭstralio kaj Nov-Zelando, kiuj montris sin tre favore impresitaj de la grandeco kaj internacieco de la kongreso.

Kiuj ĉeestis la Sofian kongreson kaj vidis tie la efikan apogon, kiun donis la urbaj kaj landaj aŭtoritatoj, tiuj eble sentis en Hago ian mankon de oficiala interesiĝo pri la kongreso, ekster la oficiala akcepto en Binnenhof, la kelkaj informaj broŝuroj en Esperanto eldonitaj de la registaro kaj ekster la Protekto de la Reĝino kaj Honora Komitato. Ankaŭ la nederlanda publiko, kiu fieras pri sia ioma scio de du tri fremdaj lingvoj, ŝajnis embarasita pro la nevola konstato, ke tiuj ne sufiĉas. Tamen en si mem la kongreso bone sukcesis, la ĉirkaŭaĵoj estis vere agrablaj, kaj oni povas esperi, ke tiu grava manifestacio lasos sian stampon en la konscio ankaŭ de la kongresa lando.


## Unuaj decidoj de la nova Estraro

Post pluraj longaj komitataj kunsidoj, je vendredo la 7 aŭgusto kristaliĝis la formo de la Estraro, kiu gvidos la agadon de Universala Esperanto-Asocio dum la venontaj tri jaroj. La unua kaj plej grava ŝanĝo estas tio, ke prof. Ivo Lapenna, post 26 jaroj kiel estrarano kaj Ĝenerala Sekretario, faris la logikan pluan paŝon, estante elektita kiel Prezidanto. En tiu funkcio li konservos la fakon de eksteraĵoj kaj kompreneble restos Direktoro de CED. Apud s-ro Wensing eniras la Estraron ankaŭ alia industriisto kiel vic-prezidanto: la siatempa prezidanto de KELI, s-ro Erik Carlén. Li speciale atentis la enkondukon de modernaj labormetodoj en la Asocion. La grandan ŝarĝon de ĝenerala sekretario transprenas s-ro Günther Becker, la ĝisnuna prezidanto de TEJO, kiu krome funkcios kiel estrarano pri informado kaj pri kongresoj.

El la aliaj estraranoj, D-ro Albault kaj s-ro Woessink restos en siaj malnovaj oficoj, dum s-ro Maurice Jaumotte, prezidanto de la Belga Esperanto-Federacio, fariĝas estrarano

pri landaj kaj fakaj asocioj anstataŭ s-ro Czuba, kaj s-ro Józef Toczyski (Pollando) aldoniĝas kiel estrarano pri lernejoj. Fine, por ĉiam pli firmigi la rilatojn inter UEA kaj ĝia junulara sekcio, la Komitato elektis s-ron Humphrey Tonkin, estrarano de TEJO, kiel reprezentanton de TEJO ĉe la Estraro. Tamen, ĉar la statuto ne permesas pli ol ok estraranojn, s-ro Tonkin estos sen voĉdona rajto. (La listo de novaj estraranoj troviĝas sur la antaŭa paĝo).

El la unuaj decidoj de la nova Estraro, pri kiuj oni povas legi pli detale sur p. 145, certe plej vastan intereson portas la decido pri Budapeŝto kiel kongresurbo por 1966. La hungara ĉefurbo havas tian famon en la historio de la Internacia Lingvo, ke tiu kongreso estos iasence kvazaŭ hejmeveno. La Estraro traktis plurajn proponojn pri novaj eldonaĵoj, inter kiuj elstaras la decido eldoni en la serio "Oriento-Okcidento" la grandan tragedion "Reĝo Lear" de William Shakespeare en traduko de K. Kalocsay.



S-ro Günther Becker,  
nova Ĝen. Sekretario  
de UEA.



Elektinte Profesoron Ivo Lapenna kiel sian novan Prezidanton, Universala Esperanto-Asocio certigis al si duflankan avantaĝon. Dum unuflanke estas netaksebla avantaĝo, ke la plej altan oficon de la Asocio okupis homo, kiu pli ol iu alia kontribuis al la postmilita refortiĝo de UEA kaj de la tuta movado, aliflanke egale grave estas, ke en tiu pozicio staru homo respektata en eksteraj medioj. Lerninte la lingvon en 1928, enirinte la Estraron de UEA en 1938, aktive laborinte por la reorganizo kaj plivastigo de la asocia agado en la lastaj 15 jaroj, kreinte kaj disvolvinte la Centron de Esploro kaj Dokumentado, batalinte senĉese por la rekono de Esperanto ĉe interŝtataj organizaĵoj, kaj fine dum naŭ longaj jaroj portinte la plenan ŝarĝon de Ĝenerala Sekretario, li konas plej ekzakte la fortojn je nia dispo, la vojojn irendajn, kaj la tutan maŝinaron de la organizita movado. Samtempe, por la ekstera mondo li estas forta personeco, membro de internaciaj fakaj organizaĵoj, preleganto en granda universitato, kaj ŝatata verkisto sur jura tereno. Lia festa parolado en la 49-a Universala Kongreso estas plia pruvo pri liaj kvalitoj.

Jam du fojojn ni kongresis en Nederlando — en 1920 en Hago kaj precize antaŭ dek jaroj, en 1954, en Haarlem — kaj en ambaŭ okazoj tiu ĉi ĉarma lando, plena de belaĵoj kaj artaĵoj, akceptis nin per etenditaj brakoj kaj malfermitaj koroj. Ĉi-foje aldoniĝas la plej granda honorigo, kiun invitanta lando povas doni al Internacia Kongreso: la alta protekto de Unua Civitano, Ŝia Moŝto Juliana, la Reĝino de Nederlando.

Ne nur la Kongreso, sed la tuta neŭtrala E-movado sentas profundan dankemon pro tiu ĉi honoriga gesto kaj la simpatioj, kiujn Ŝia Reĝina Moŝto montris per ĝi por niaj strebadoj (aplaŭdo). La fakto, ke en la Honora Komitato troviĝas, apud la Ministro pri Instruado, Arto kaj Scienco, S-ro Bot, kies reprezentanton ni havas la honoron vidi en nia mezo, kaj D-ro Drees, la Honora Ministro, bone konata inter la esperantistoj, ĉar li mem parolas la Internacian Lingvon, ankaŭ la plej eminentaj personecoj de la Nederlanda politika, scienca kaj ĝenerale kultura vivo, inter kiuj la Prezidanto de la Nederlanda Akademio de Sciencoj, ne povas esti interpretata alimaniere ol kiel plua signo de apogo al la ideo de komuna lingvo fare de tiu ĉi eta kaj, kiel ĝia nomo indikas, malalta lando, sed naskinta altstaturajn pensulojn, kiuj kontribuis eternajn verkojn al la multkolora kaj multfaceta mozaiko de la monda kulturo (aplaŭdo).

## Tri titanoj

El ili almenaŭ tri altiras apartan atenton.

La unua estas Erasmo, kiu fine de la 15-a kaj komence de la 16-a jarcentoj formiĝis, kiel la patro de humanismo. La alia estas la granda Rembrandt, kiu uzis la alian lingvon — tiun de la koloro kaj peniko — por esprimi sin en la portretoj, pejzaĝoj kaj scenoj el la Biblio, kiujn li eternigis. Samtempulo, sed iom pli juna ol Rembrandt, estis alia Nederlandano, kiu alportis gloron al sia patrolando, sed kiu kreadis sur tute alia kampo. Hugo Grocius, humanisto, jura filozofo, publicisto kaj diplomato estas ĉefe konata kiel la fondinto de la moderna scienco de internacia publika juro.

Pro sia universaleco, la tri ĵus menciitaj

grandeguloj, ĉiu titano sur sia tereno, meritas omaĝon de kongreso universala laŭ konsisto, programo kaj celo. Erasmo pro sia humanismo, pro sia lukto kontraŭ ignorado kaj superstiĉoj estas inspira ekzemplo por ni ĉiuj, kiuj ankoraŭ devas fronti la samajn malamikojn ne nur de Esperanto, sed de la progreso ĝenerale. Rembrandt, pro la tuthomeco de siaj motivoj kaj arta esprimo komprenebla por ĉiuj kaj tuŝanta la korojn de ĉiuj en ĉiuj anguloj de la terglobo, simbolas la esencan egalecon de la homa naturo super ĉiuj rasaj, naciaj, religiaj kaj ideologiaj diferencoj, kaj precize tiu principa homegaleco estas la bazo de nia tuta agado celanta doni al egalaj homoj egalajn eblecojn kompreni kaj sin komprenigi (aplaŭdego). Grocius, per siaj tezoj pri la libereco de la maro, per siaj studoj pri interŝtataj rilatoj kaj la juraj principoj kiuj reguligas ilin, fondis la fundamentojn de tiu jura branĉo, kiu komencis almenaŭ parte regi la rilatojn inter la ŝtatoj kaj tiel kontribuas al pacaj ligoj inter la popoloj, do helpas per aliaj rimedoj al atingo de la granda idealo de monda paco, por kiu ni disponigas la Internacian Lingvon kiel la ĉefan instrumenton (forta aplaŭdo).

La tutan 19-an jarcenton markas klopodoj antaŭenigi internacian kompreniĝon kaj evoluigi la ideon de paco. Kiam fine de tiu jarcento oni decidis kunvoki packonferencon, kiu lando povis esti pli konvena por tiu celo ol la lando de Hugo Grocius? Efektive, la Unua Packonferenco en 1889 kaj la Dua en 1907 okazis en tiu ĉi sama interesa Hago, en kiu ni nun kongresas. Kiam post la Unua Mondmilito estis kreita vera Internacia Kortumo, kies tasko estas decidadi senpartiece, per apliko de juro kaj el vidpunkto monda, pri la malkonsentoj kaj konfliktantaj pretendoj de la ŝtatoj, denove Hago montriĝis kiel la plej taŭga loko por ĝia sidejo.

La feliĉa hazardo volis, ke ĝuste en tiu ĉi urbo, historie kaj aktuale tiel intime ligita al porpaca laboro, en kies koro troviĝas unu el la ĉefaj instrumentoj de la monda paco, UEA lanĉas dum tiu ĉi Universala Kongreso novan agadon por doni sian apogon al la Jaro de Internacia Kunlaborado.



En januaro de 1963 la Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj decidis, ke la plej bona maniero celebri la 20-jaran datrevenon de la fondiĝo de Unuiĝintaj Nacioj, estas per intensigo kaj vastigo de la internacia kunlaborado kaj per komunaj agadoj, entreprenotaj en la intereso de ĉiuj.

La Estraro de UEA akceptis la inviton de la Sekretariato de Unuiĝintaj Nacioj partopreni en tiu celebrado, kaj tute certe la tuta E-movado donos ne formalan, sed realan kontribuon al tiu agado de Unuiĝintaj Nacioj, kiu celas mildigi streĉitecojn, progresigi interkompreniĝon kaj tiel helpi al forigo de la kaŭzoj, kiuj minacas la pacon.

## Paco kaj "paco"

Ni bone scias, ke la ideo de la Internacia Lingvo, ek de kiam ĝi ekĝermis en la menso de junulo el Bjalistok tra ĉiuj realigoj ĝis la hodiaŭa tago, estis kaj estas firme ligita al la penso pri interkompreniĝo ne nur buŝa sed ankaŭ kora, al toleremo rilate la religiajn sentojn, opiniojn kaj vivmanierojn de aliaj, al amikaj rilatoj inter la rasoj kaj nacioj, al monda paco. Tiu idealo inspiris kaj plue inspiras nian tutan agadon. Ni laboris, laboras kaj plue laboros por la Internacia Lingvo kaj tio per si mem implicas laboron porpaca (fortega aplaŭdo). Hodiaŭ ni aŭdis preskaŭ en ĉiu parolado, ek de tiu de la oficiala reprezentanto de la Nederlanda Registaro, tra tiuj de multaj reprezentantoj de niaj landaj organizaĵoj, ĝis miaj propraj vortoj, plurfoje la esprimon "paco". Sed ni pensu en tiu ĉi momento tute klare. Ekzistas paco kaj "paco". Ekzistas diversaj specoj de paco. Ankaŭ arestitoj kaj kondamnitaj en karcero estas tenataj en paco. Ni ne estas por tia paco! (tondra aplaŭdo). Ni estas por paco en libereco, en kiu la fundamentaj homaj rajtoj estas respektataj, ĉar nur tia paco estas konforma al la homa digno kaj garantias personan bonfarton, materian prosperon kaj intelektan progreson. (forta aplaŭdo).

## La Jaro de Internacia Kunlaborado

Kun tiaj pensoj ni aliĝas al la Jaro de Internacia Kunlaborado kaj donos nian plenan apogon al Unuiĝintaj Nacioj, por ke ĝi povu doni kiel eble plej bonajn rezultojn. Samtempe, plene konsciaj ke la lingva diverseco prezentas la fundamentan obstaklon al vastigo kaj profundigo de internacia kunlaborado, ni atentigos la Sekretariaton de Unuiĝintaj Nacioj kaj ĉiujn ŝtatojn-membrojn pri la solvo, kiun prezentas la Internacia Lingvo. La propono jam estas presita en pluraj lingvoj kaj en aliaj ĝi nun estas preparata. Necesas ke ĉiuj niaj organizaĵoj kaj ĉiu unuopulo streĉu ĝis maksimumo siajn fortojn por disvastigi la ideon de internacia kunlaborado, sed sam-

tempe ankaŭ por atentigi, ke la baza antaŭkondiĉo por la atingo de tiu celo estas la ĝeneraligo de la uzo de la Internacia Lingvo. Ni devos kolekti multajn subskribojn: milojn kaj dekmilojn, ĉar tio estos la bazo de nia agado. Tamen, ni ne limigos nin nur al tio. Speciala memorando estos sendita al Unuiĝintaj Nacioj; apartaj dokumentoj estos eldonitaj de la Centro de Esploro kaj Dokumentado; intensa informado havos la taskon diskonigi la rolon de la Internacia Lingvo por la internacia interkompreniĝo. Multe da laboro atendas ĉiujn niajn organizaĵojn, ĉiujn unuopulojn esperantistojn.

Kompare kun la tuta homaro ni sendube estas malgranda socia grupo, sed ni havas en niaj manoj potencon instrumenton, prestiĝan pozicion, principe bonajn organizajn formojn kaj tial kvankam malgrandaj ni povas fari miraklojn, se ni estas fortaj kaj persistaj, se ni estas antaŭ ĉio unuecaj. Tiurilate mi povas nur ripeti ĉi tie la vortojn de Zamenhof, kiujn li eldiris en sia lasta kongresa parolado en 1912, en Krakovo.

*"Antaŭ ol mi formetas de mi ĉian oficialan rolon, mi ankoraŭ la lastan fojon admonas vin: laboru ĉiam en plena unueco, en ordo kaj konkordo... Per unueco ni pli aŭ malpli frue nepre venkos, eĉ se la tuta mondo batalus kontraŭ ni; per interna malpaco ni ruinigus nian aferon pli rapide, ol tion povus fari ĉiuj niaj malamikoj kune..."*

Tiuj profetaj pensoj de Zamenhof regu la laboron de tiu ĉi Kongreso, ili estu antaŭ niaj okuloj en la Jaro de Internacia Kunlaborado. Ili akompanu nian tutan agadon ankaŭ en la estonteco. Se ni observos tiun saĝan konsilon, veran postulaton por movado celanta internacian kompreniĝon, ni certe sukcesos. Se ni malobservos ĝin ni riskas ne nur detrui ĉion, kion miloj da niaj plej sindonaj agantoj kreis en la pli ol 75-jara ekzistado de la Internacia Lingvo, sed ankaŭ kompromiti por ĉiam la ideon mem de komuna, neŭtrala, supernacia lingvo.

☆

Nun, kiam ni staras sur la sojlo de la Jaro de Internacia Kunlaborado, ni unuiĝu sente kaj pense ankoraŭ pli firme en nia UEA por povi laborante en konkordo kaj helpante unu la alian svinge antaŭenpuŝi la ideon de komuna lingvo kaj konsiderinde vastigi la aplikon de Esperanto en la praktiko, tiel ke la Jaro de Internacia Kunlaborado fariĝu samtempe la Jaro de la Internacia Lingvo en la intereso de pli bonaj rilatoj inter la popoloj, de la monda paco kaj tiel de ĉiuj rasoj, ĉiuj nacioj, en la intereso de ni ĉiuj. (aplaŭdego).

(teksto koncizigita)





## Ĉefaj punktoj de la Inaŭguro

La sceno en Kurhaus, Scheveningen, kie okazis la Solena Inaŭguro de la 49-a UK, dimanĉon, la 2-an de aŭgusto, estis sceno bone konata por la regulaj partoprenantoj de Esperanto-kongresoj. La anticipa entuziasmo de pli ol 2000 kongresanoj, la grandaj florbukedoj, la kongresa flago superpendanta la podion... jen elementoj neniel novaj, kaj tamen ĉiujare ili imponas kaj ekscitas per sia promeso pri la venontaj tagoj da plene internacia vivo.

S-ro H. W. Holmes, aganta prezidanto de UEA, en Hago prezidis jam la trian fojon Universalan Kongreson. Post bonvenigo al eminentaj gastoj, inter kiuj la ĉefceremoniestro de la Reĝa Kortego, Eksc. Pahud de Mortanges, kaj la prezidanto de la Reĝa Nederlanda Akademio de Sciencoj, Prof. D-ro Gorter, s-ro Holmes invitis la ĉeestantojn stari momenton en silento omaĝe al la forpasinta prezidinto de UEA, Prof. Yagi. Lian proponon, sendi salutan telegramon al la Reĝino kiel Alta Protektantino de la Kongreso, la ĉeestantoj aplaŭde aprobis. Mag. Schölvinnck, reprezentanto de la Ministro pri Instruado, Arto kaj Scienco, emfazis tiun Altan Protekton, kiam li salutis la Kongreson. La akcepto de la Reĝino, same kiel la nova leĝo pri laŭelekta instruado de Esperanto en nederlandaj ŝtataj lernejoj, klare montras la gravecon, kiun Nederlando atribuas al la Internacia Lingvo. Mag. J. Klaasesz, Prefekto de la Provinco Sud-Holando, deklaris sian opinion, ke multe pli valoras internaciaj interhomaj kontaktoj ol nuraj turismaj vizitoj. Nederlandaj esperantistoj invitu la eksterlandanojn en siajn hejmojn, por ke ili vidu, ke en ĉiuj landoj ekzistas similaj problemoj.

En ambaŭ lingvoj respondis al tiuj salutoj

Mag. J. Klaasesz, la Prefekto de la Provinco Sud-Holando, salutas la Kongreson. Maldekstre estraranoj Albault kaj Czuba.

la vicprezidanto de UEA s-ro Wensing. "Ĉiuj iam aŭdis pri Esperanto", diris s-ro Wensing, "sed regas ankoraŭ multaj bedaŭrindaj miskonceptoj." La esperantistoj al neniu celas trudi Esperanton, sed nur doni klaran ekzemplon de tio, kion ĝi kapablas atingi: per literaturo, kongresoj, kaj aliaj rimedoj. Manko de financaj apogoj devigas nin labori je modesta skalo, sed ni daŭrigos kun la konvinko, ke Esperanto estas taŭga solvo al urĝa problemoj. Sekvis bonvenigo de Ing. J. R. G. Isbrucker, Prezidanto de LKK, kaj danko de s-ro Holmes.

Ĉi-jare salutis la Kongreson reprezentantoj de 9 registaroj: la aŭstralia (jam iagrade uzis Esperanton kaj sekvas atente la evoluon), la aŭstra (memorigas, ke okazos en 1965 Esperanto-konferenco en Vieno), la belga, la brazila (ataŝeo en Hago), la germana (la legacia sekretario kun surpriziĝo konstatis la diverslandan fortecon de Esperanto), la hispana, la israela, la norvega, kaj fine la nov-zelanda (personajn bondezirojn sendis la Ĉefministro kaj aliaj eminentuloj). Salutis ankaŭ la Internacia Instituto por la Paco (Vieno). Skribe sendis salutojn interalie la ambasadoroj de Jugoslavio kaj Belgujo (kiel Dojeno de la ambasadoroj en Nederlando).

Post "Sonata in D opus 2 Nr. 8", de Jean Marie Leslair, interpretita de la Haga Baroka Triopo, sin prezentis sur la podio la tuta membraro de la 9-a Infana Kongreseto: okdeko da infanoj el 12 landoj. Per tio heroldiĝis la salutoj de la landaj asocioj kaj de landoj sen organizo. Ĝuste en tiu multenuanca sinsekvo de voĉoj el plej diversaj partoj de la tero esprimiĝas plej koncize kaj plej senteble la vera universaleco de Esperanto, kaj la ĉijara mozaiko el 29 landoj emociis multajn spektantojn. Salutis unue delegitoj de 19 el la 29 aliĝintaj landaj asocioj: la aŭstralia, la aŭstra, la belga, la brita, la bulgara (S-ro N. Aleksiev alportas salutojn ankaŭ de la 1600 partoprenintoj de la Bulgara Esperanto-Kongreso), la dana, la finnlanda, la franca, la germana, la hispana, la hungara (Dum sia kvarjara ekzisto HEA kreskis de 400 ĝis 2400 anoj. S-ro Kapitanj legas mesaĝon de la malsana Julio Baghy), la israela, la itala (D-ro C. Minnaja raportas pri la lerneja strategio de IEF), la japana (S-ino Isobe Y. salute invitas al la 50-a UK, vestite per festa kimono florbazonita), la jugoslava, la nederlanda, la norvega, la pola (longa aplaŭdo), la sveda kaj la svisa. Salutis poste kvin landaj asocioj ankoraŭ ne aliĝintaj: la ĉeĥoslovaka, la ĉina, la indonezia, la sudafrika kaj la venezuela, kaj kvar reprezentantoj de landoj sen ia tutlande organizita movado: Ĉilio, Hindujo, Malio (Malio estas ŝtato nur 4-jara; la Esperanto-movado estas 2-jara!) kaj fine Sovetunio, en kies nomo salutis s-ro Stepan Titov, patro de kosmonaŭto G. Titov. Estis la unua fojo de antaŭ la dua monda

(daŭrigo dekstre)



## La Komitato

Por la novaj komitatanoj A kaj B, jam elektitaj de siaj landaj asocioj kaj de la delegitoj de UEA, la unua tasko estis elekti novajn komitatanojn C por la venonta trijara periodo. La voĉdono favoris jenajn 12 personojn: G. Becker, E. Dahl, H. W. Holmes, E. Lapenna, G. Maertens, T. Sekelj, J. Thierry, E. L. M. Wensing, N. Aleksiev, R. H. M. Markarian, M. Savir kaj C. Thollet, el kiuj la kvar lastaj estas novaj komitatanoj. Restas ankoraŭ unu vaka loko, kiun la Komitato rajtos poste plenigi. Kiel oni vidas, la novaj elektitoj estas personoj jam konataj pro sia laboro por Esperanto, kaj al kies laboremo ankaŭ en la estonteco la Komitato montris sian fidon.

La nova Komitato tiel formita turnis sian atenton unue al pasintaj laboroj, aprobante kun specialaj dankoj al s-ro E. J. Woessink, kaj al la Direktoro de CED la Estraran Raporton por la laborjaro 1963-4. La en Sofio formita komisiono pri la membro-sistemo decidis, post mallonga diskuto, retiri sian proponon pri reformo de la membro-sistemo, kiu do restos senŝanĝa. Projekto de komitatano Tibor Sekelj pri starigo de novaj kampanjoj sub direktado de nova centro estis malakceptita favore al plivigligo kaj kuncentrigo de la ekzistantaj fakaj asocioj. Dum la Kongreso estis starigitaj apartaj komisionoj por la branĉoj Financoj, Lernejoj, Laborplano k.a., kaj iliaj detalaj raportoj inkluzivis nombron da sugestoj por estonta agado.

Turnante sin plene al la estonteco, la Komitato akceptis unuanime la buĝetojn de UEA kaj CED por 1965. Ĝi nomis du ekstrajn membrojn de la Komisiono por la Internacia Ekzameno: s-ron A. Venture, gvidanto de la superaj kursoj de la Londona Klubo, kaj s-ron T. Nakamura, la konata japana esperantologo kaj akademiano. Fine, sed plej grave, ĝi elektis la novan Estraron, priskribitan sur p. 141, kaj unuanime elektis s-ron H. W. Holmes kiel Honoran Prezidanton pro liaj longaj laboroj kaj grandaj meritoj por la Asocio.

---

(daŭrigo de p. 144)

milito, kiam universalan kongreson en okcidenta Eŭropo salutis reprezentanto de Sovetunio.

Per la unua movimento de la "Sonata in G opus 1 Nr. 2" de Hendrik Focking la inaŭgura solenaĵo atingis sian kulminon: la festa parolado de Prof. Ivo Lapenna, kies koncizigitan tekston ni presas sur p. 142. La certa sukceso de ĉiu el la longa serio da festparoladoj, kiujn faris Prof. Lapenna en universalaj kaj aliaj kongresoj, ne dependas sole de lia supera oratora talento mem, nek sole de la ĉiam funde elpensita enhavo de la paroladoj, sed ankaŭ de tiu esenca ligiteco, kiun lia personeco forĝis tra la jaroj inter li kaj la publiko, kaj kiun li scipovas ĉiam nove tuj establi.

## La Estraro

La nova Estraro, pro sia elekto nur malfrue en la kongresa semajno, povis nur dufoje kunsidi, sed sukcesis enpremi en kelkajn horojn la pli grandan parton de la fiksita tagordo. Ĉeestis ĉiuj estraranoj kun escepto de s-ro Carlén kaj d-ro Albault, kiuj devis pli frue forvojaĝi. Krome ĉeestis s-ro Tonkin, la Direktorino de la C.O., kaj la Redaktoro. Partojn ĉeestis ankaŭ reprezentantoj de la hispana, hungara, finlanda kaj israela landaj asocioj.

Tutunue la Estraro devis inter si dividi la plej gravajn taskojn plenumotajn (vidu p. 141). Sekvis decido pri la kongresurbo por 1966. La lastatempaj antaŭenpaŝoj de la hungara Esperanto-movado, precipe sur lerneja tereno (ĉi-somere en Hungarujo ĉ. 300 pedagogoj lernas la lingvon en 4 kursoj), la sukcesa IFEF-kongreso en la sama urbo antaŭ 2 jaroj, kaj la fortaj apogoj de la hungara registaro — ĉio ĉi estis gravaj faktoroj en la decido favore al Budapeŝto. Por 1967 la Estraro ne ankoraŭ faris definitivon decidon, sed konsideros la demandojn en sia printempa kunsido.

Konsiderinte la diversajn oficojn ligitajn al la Asocio, la nova Estraro plejparte renomis la ĝisnunajn oficulojn. Esceptoj estas jenaj: s-ro Toczyski anstataŭos profesoron Lapenna en la Konsulta Komisiono pri Lernejoj; la komisiito pri agado en Afriko kaj Azio estas malŝargita, kaj la agado fariĝos respondeco de la Ĝenerala Sekretario; la komisiono por interŝanĝo de okcidentaj kaj orientaj kulturaj valoroj estas nuligita, kaj la afero fariĝos tasko de la estrarano pri kulturaj aferoj; s-ro Toczyski aldoniĝas al la kontrolkomisiono pri lernolibroj.

La Asocio daŭrigos eldonadon de la revuo "Monda Kulturo", esperante, ke ĝia plia firmiĝo kaj reguliĝo allogos ankoraŭ pli da abonantoj, tiel ke estos eble poste malaltigi la kotizon. Koncerne librojn, la Estraro decidis eldoni, anstataŭ la pli frue intencita represo de iu verko de Shakespeare, la novan tradukon de "Reĝo Lear" de la sama aŭtoro (okaze de la 400-jara datreveno), faritan de Kolomano Kalocsay kun revizio de Reto Rossetti. Estas certe, ke tiu nova eldono en la serio "Oriento-Okcidento" fariĝos nova vojmontrilo en la traduka literaturo de Esperanto. La Estraro plie konsideris aliajn eldonprojektojn, kaj faris kelkajn principajn decidojn.

Ĝi fine decidis esplori rimedojn por doni helpon al la nove fondita Konga Esperanto-Instituto, kaj notis, ke f-ino Elsie Parson, jam veterano de la agado en Afriko kaj Azio, intencas denove entrepreni vojaĝon al la oriento por laŭeble instrui la lingvon en Hindujo, Cejlono kaj Japanujo, antaŭ la 50-a UK en Tokio. Ankaŭ la KKS, s-ro Pompilio, vojaĝos al Tokio jam baldaŭ.

La kunsidoj de la Estraro finiĝis per agrabla kongresfina renkontiĝo neformala kun la anoj de la Haga LKK.



## Ĝeneralaj Kunvenoj kaj Sekcioj

### Unua Ĝenerala Kunveno

La unua parto, sub prezido de s-ro Wensing, akceptis salutojn de fakaj kaj neneŭtralaj organizaĵoj: la jurista, fervojista, blindula, studenta, veterana, katolika, ornitologia kaj skolta. Krome salutis la direktoro de Fondaĵo Anne Frank en Amsterdam, portante personajn salutojn de la patro de Anne Frank, kaj s-ino Schulze (Usono) nome de la organizaĵo "Popolo al Popolo".

En la dua parto de la kunveno, kiun prezidis s-ro Günther Becker, raportis la ĝenerala sekretario de TEJO, d-ro Carlo Minnaja, pri la rezultoj de la Junulara Jaro 1963. Lia raporto estis plena je la nova optimismo generita dum la Jaro de la Junularo. Hodiaŭ TEJO estas potenca organizaĵo de preskaŭ 10 000 membroj kontraŭ nur 600 antaŭ 8 jaroj. Aliĝis kvar novaj landaj sekcioj dum la pasinta jaro, kaj regule aperis la unua jarkolekto de la modern-aspekta revuo "Kontakto", kiu celas trakti ĝeneralajn temojn junularajn sen rekta mencio pri Esperanto. TEJO jam komencas turni sian atenton ankaŭ al la junularo de Afriko.

### Dua Ĝenerala Kunveno

La Duan Ĝeneralan Kunvenon ĉeestis, same kiel la unuan, inter 100 kaj 150 kongresanoj. La malalta nombro verŝajne ŝuldiĝis al la fakto, ke necesis okazigi la Ĝeneralajn Kunvenojn en alia ejo (Kurzaal), anstataŭ en la kongresejo mem. Unue la kunveno diskutis la Estraran Raporton por 1963-4, kaj la Redaktoro de "Esperanto", anstataŭante la Ĝeneralan Sekretarion, kiu pro kunsido de la Komitato ne povis ĉeesti, respondis al diversaj kritikoj kaj komentoj, precipe pri la revuo, la laboro de la Centra Oficejo kaj la gazetaraj servoj. La Raporto estis jam aprobita de la Komitato.

En la dua parto de la kunveno raportis reprezentantoj de kunlaborantaj fakaj kaj aliaj organizaĵoj, pri sia laboro ĝenerale kaj pri la dumkongresaj laboroj. Sin anoncis la organizaĵoj instruista, studenta, veterana, katolika, kvakera kaj fervojista.

### Unua Labora Sekcio

Post interrompo de 3 jaroj, denove la Kongreso dediĉis apartajn kunsidojn al difinitaj gravaj temoj ligitaj kun Esperanto. La Unua Sekcio, kiun prezidis Prof. Lapenna, aŭskultis tre ampleksan raporton de s-ro R. H. M. Markarian, voĉe resumitan de s-ro Tonkin, pri la "Eduka Valoro de la Internacia Lingvo en Lernejoj". La raporto estis kunmetita laŭ la respondoj al enketo de CED, kaj ĝi aperos kaj en la angla, kaj en Esperanto kiel unu el la plej gravaj dokumentoj de CED, okaze de la Jaro de Internacia Kunlaborado. La ĉefaj konkludoj el la enketo koncernas la facilecon de Esperanto kompare kun naci-lingvoj, la rolon de Esperanto kiel baza lingvo por lernado de aliaj lingvoj, la kuraĝigan

efikon de Esperanto, kiun lernantoj povas post relative mallonga tempo apliki en praktikaj manieroj, kaj la helpon, kiun donas Esperanto al aliaj lernobjektoj (ekz. geografio). Post larĝa diskuto inter la 150 ĉeestantoj, la Sekcio akceptis jenan decidon: "La Unua Sekcio aprobas kun danko la Raporton de CED... ellaboritan de s-ro R. Markarian, sugestas vastan diskonigon de la Raporto, petas CED konsideri la rimarkojn faritajn en la diskuto kaj instigi al pliaj eksperimentoj precipe rilate la lernadon de Esperanto kaj la fremdaj naciaj lingvoj en la lernejoj".

**H. W. Holmes,  
O.B.E., nova  
Honora Prezid-  
anto de UEA,  
pacience  
prezidis la  
49-an U.K.**



### Dua Labora Sekcio

Pro malsaniĝo de la antaŭa estrarano pri informado, la raporton prezentis prof. Lapenna. Prezidis s-ro Wensing. En sia enkonduko, prof. Lapenna pledis por pli taŭgaj metodoj de informado, bone adaptitaj al la ŝanĝigantaj sociaj kondiĉoj. Tro ofta apliko de verdaj steloj kaj sloganoj ne apartenas al modernaj metodoj. Necesas objektiva informado pri Esperanto, uzante konkretajn pruveblajn faktojn. Spertoj montris, ke la publika opinio estas favorigebla, kondiĉe ke oni ne agu kiel stranguloj, sed atente sekvu la Principaron de Frostavallen.

En la posta diskuto partoprenis nombro da konataj aktivuloj kaj aŭdiĝis kelkaj aparte interesaj proponoj. S-ro Pickel (Germanujo) proponis traduki la novan germanlingvan broŝuron "Modernaj homoj parolas Esperanton" en la Internacian Lingvon, por ke la aliaj landaj asocioj havu la eblecon adapti kaj retraduki ĝin en siajn lingvojn. S-ro Tibor Sekelj opiniis, ke necesas jam detaligi la Principaron de Frostavallen, kaj ellabori bazajn prelegojn por diversaj medioj: studenta, junulara, fakaj, k.s. Pluraj diskutantoj menciis ankaŭ la valoron de filmoj kaj televido.





*La 17-a Sesio de la 2-a Periodo de la Internacia Somera Universitato okazis sub Rekto-reco de prof. C. C. Berg, konata lingvisto, kies inaŭgura parolado estis dediĉita al la rolo de unu simpla internacia lingvo, precipe kiel interpopola kaj interŝtata lingvo por la landoj de Azio kaj Afriko. La prelegojn ĉeestis ĝis 500 personoj.*

### **Konfliktaj postuloj por la fonetiko de internacia lingvo**

Resumo de prelego de John Wells, asistento en la Universitato de Londono.

Generale la lingvistoj malatentis la problemon de internacia lingvo. Escepto estis la rusa princo Trubetzkoy, kiu provis difini la fonetikon de ideala internacia lingvo, elektante tiujn parolsonojn, aŭ pli ĝuste tiujn sonkontrastojn, kiuj estas komunaj al ĉiuj pli grandaj lingvoj de la mondo. Laŭ Trubetzkoy, necesus eviti la uzon de akcento aŭ de aspiracio por distingo de signifo, kiel okazas en la angla. Li konsilis eviti la sonon *h*. La vokaloj *a*, *e*, *i*, *o*, kaj *u* estas sufiĉe universalaj, kaj la vasteco de la vokaloj ne tro gravas (kiel pruvis la praktika sperto per Esperanto). Nur tri plosivoj estus uzeblaj, prefere *p*, *t*, *k*; *m* kaj *n* estus uzeblaj, sed *f* kaj *h* evitindaj; *s* estas ĝenerale facila sono, sed multaj nacioj ne povas kontrastigi ĝin kun *ŝ*. El *l* kaj *r* Trubetzkoy konsilis uzi nur unu, prefere *l*, ĉar tiuj du sonoj estas konfuzataj de ĉinoj kaj japanoj. Diversaj kombinoj de konsonantoj kaj vokaloj estus malpermesitaj, kaj el la konsonantoj nur *n* povus fini vorton.

Kompreneble, ĉiuj ĉi estas nur teoriaj postuloj por internacia lingvo, same kiel nur teoria estas la aserto de Trubetzkoy, ke "Esperanto estas relative facile lernebla nur por latinidaj kaj ĝermanaj popoloj". La praktiko pruvis la kontraŭon. Se Esperanto posedus nur tiujn sonojn, kiujn rekomendas Trubetzkoy, ĝi do devus rezigni pri alproprigo de la vasta trezoro de internaciaj — precipe sciencaj — vortoj, kiuj fariĝus nerekoneblaj. (Ekzemple *radio* fariĝus *lato* aŭ sim.) Kiel en multaj aliaj aspektoj, Esperanto prezentas kompromison inter la teoriaj postuloj de internacieco kaj simpla fonetiko. Ĝia fonetiko estas multe pli simpla ol ekz. tiu de la angla, kaj tamen permesas rekoneblan adopton de internaciaj terminoj. La prononco de Esperanto ŝajne fariĝas ĉiam pli unueca, kaj la preleginto rekomendas kiel modelon por akceli unuecon prefere la serbo-kroatan prononcon, ol la italan, kiu havas pli da vokaloj ol Esperanto.

### **La evoluo de la Esperanta vortrezoro**

Resumo de prelego de prof. Gaston Waringhien, Prezidanto de la Akademio de Esperanto.

La ĉefa postulo por lingva internacia estas facileco. Rilate la gramatikon, Zamenhof nur tre relative kontentigis tiun postulon. Rilate la vortaron, ekzistas du malsamaj rimedoj de faciligo, kiel Zamenhof povis konstati en la rusa kaj germana lingvoj. Unuflanke oni povas elekti la plej internaciajn vortojn (kun la malavantaĝo, ke internacieco estas ĉiam nur relativa), aliflanke oni povas utiligi la sistemon de derivado (kun la malavantaĝo, ke la vortoj per tio longiĝas). Efektive, Esperanto aplikas ambaŭ rimedojn paralele.

Tiu ĉi interbatalo de principoj rezultigis kritikojn kaj reformpostulojn, kiuj kondukis al la krizo de 1894, kiu siavice havis influon je la vortaro. Evidentiĝis, ke la literatura aplikado de la lingvo postulas vastan vortotrezoron, kiun la Universala Vortaro ne povis liveri. Sekve Zamenhof enkondukis multajn neologismojn en sian Germanan Esperanto-Vortaron. Cart reagis proteste. Li prave atentigis, ke la novaj vortoj ne estas internaciaj, sed aliflanke ili estis ĝuste la vortoj bezonataj por literaturo (*kaŭri*, *taŭzi*, *kveri*, *boulo*, k.s.) Kvankam la proponoj de Zamenhof provizore enterigis la Ido-krizon, tamen enkondukiĝis aro da novaj vortoj (*akuzi*, *ŝrumpi*, *kalva*, *kvereli*, k.a.), kaj Kabe kaj Grabowski enkondukis aliajn. Post la morto de Zamenhof disfloris la literaturo, kreante maturan poezian lingvon. La gravaj kontribuoj de la Budapeŝta kaj skota skoloj estis rekte en la Zamenhofa tradicio.

### **Aliaj prelegoj**

Sur popularscienca kampo, prof. B. Popović kaj prof. V. Peevski traktis du malsamajn aspektojn de tre aktuala temo: respektive, "La vivo de homo sur aliaj planedoj" kaj "Utiligo de artsatelitoj por pacaj celoj". Prof. Kawamura, japana biokemiisto, priskribis "Japanajn mangajojn de nutrokemia vidpunkto", kaj prof. Oton Pancer prelegis pri la nutra valoro de fruktoj kaj pri rimedoj por plimulti fruktomangadon. Prof. Lapenna komparis la formuladon de "La Homaj Rajtoj en la Universala Deklaracio kaj Eŭropa Konvencio". Lingvistikan temon elektis prof. Régulo Pérez, kiu spuris la batalon de "La hispana kontraŭ la prakanariaj lingvoj". La tekstoj de iuj el la menciitaj prelegoj verŝajne aperos en "Monda Kulturo" aŭ aliaj revuoj.

**17-a sesio,  
dua periodo**



## OFICIALA TEATRA VESPERO

Recenzis  
V. Sadler



Vanča Kljaković,  
ĉefrolinto en  
"Don Perlimplino"  
kaj aŭtoro de  
"Hanibalo".

### Federico Garcia Lorca: *La amo de Don Perlimplino*

Dekomence necesas diri, ke la unua verko elektita por la Oficiala Teatra Vespero ne kontentigis ĉiujn rigardantojn. Parte, verŝajne, tio rezultis el ĝia tute aparta karaktero, sed certe estis gravaj ankaŭ la teknikaj mankoj kiuj malhelpis plenan ĝuon.

Kvankam subtitolita "komedieto", *La amo de Don Perlimplino*, finiĝante per la sinmortigo de la heroo, ne permesas facilan klasigon en iun el la bazaj kategorioj de la teatro. Eble plej trafe ĝin karakterizus la vortoj "romantikeca poezio". Komediaj elementoj troviĝas, unue, en la portreto de maljuniĝanta fraŭlo, kiun la kaprico de servistino svatigas al juna belulino. Tiu karakterizo estas delikate desegnita, sed ĝis la lasta bildo de la verko okazas nenio eksterordinara, almenaŭ en kvalita senco. En kvanta senco povas esti eksterordinara la sinsekva vizito de kvin (5) amantoj al la bela Belisa dum ŝia nupta nokto kun la dormema Perlimplino. Sed nenio en la ĝistiamaj okazaĵoj divenigas la ŝanĝon de etoso, kiu sekvas. La poezia paradokso, kiun Garcia Lorca volis prezenti, konsistas en tio, ke nur per sia heroeca sinmortigo la kompatinda Perlimplino povas pruvi al la senatenta Belisa la junecon de sia koro. Nur per tiu ekstrema rimedo li povas gajni ŝian (tro mal-

fruan) amon.

Sendube tiu neatendita fino povus esti emocia: povus eĉ vekti kulposenton en la rigardantoj, kiuj pli frue mokis la kokritan edzon. Sed bedaŭrinde tiu efekto plejparte perdiĝis en Hago pro la mismanipuloj de la scenejaj teknikistoj, pro la fulmeksplozoj de fotiloj en maloportunaj momentoj, kaj foje pro la malĝentileco de kelkaj spektantoj. Ankaŭ la aspekto de amanto, kiu sin maskas per sia mantelo, tiel facile memorigas pri la batoso de Victor Hugo kaj pri la plej ekscesa romantiko de lia periodo, ke perdiĝas tiu ekvilibro distinganta poezian komedion disde farso.

Sub tiuj cirkonstancoj estas malfacile prijuĝi aktorajn meritojn, sed konvinke intrigas la servistino (Silva Fulgosi), bele kantis Belisa (Zdenka Heršak), kaj Vanča Kljaković, aŭtoro de *Hanibalo*, lasis vidi solidan talenton. Apartan ĉarmon aldonis la dekoracioj de Marcel Cockx.

### A. P. Ĉeĥov: *Edziĝpropono*

Tute alia varo estis la *Edziĝpropono* de la granda rusa dramisto. En ĝi troviĝis neniom da hispana poeziemo, sed abundo da varma ŝercemo rusa. Sen ia dubo la plej elstara sukceso de la tuta vespero estis la brila farsado

## LIBERVOLAJ VESPEROJ

Recenzis  
Michel Duc  
Goninaz kaj  
V. Sadler

Marijan Matković:

### *La morto de Lia Ekscelenco*

La du jugoslavaj teatraĵoj prezentitaj de IAT dum la Haga Kongreso havas komunajn trajtojn: ili estas unuaktaj teatraĵoj kun idea celo. En ambaŭ la simbolo esprimiĝas per fantazia artifiko, inkuba en la unua, stranga, eĉ iel absurda en la dua.

En *La Morto de Lia Ekscelenco*, Marijan Matković uzas la artifikon de la fantomo, kiu venas riproĉi al elstara politika gvidanto — ĉefministro — la malhonorajn agojn, dank' al kiuj li kariervis, kaj la perfidon de la junaĝaj idealoj. La fantomo estas la propra portreto de la ĉefministro en la junula epoko. Al tiu baza ideo aldoniĝas la temo de la morto kaj satiro de la Historio tia, kia ĝin reverkas la politikistoj. La lastaj vortoj: Partio, Nacio, Venko, komikaj kaj tragikaj samtempe en sia emfaza absurdeco, certe vekis reeĥojn ĉe multaj spektantoj.

### Vanča Kljaković: *Hanibalo*

En *Hanibalo*, de V. Kljaković, jam prezentita en Sofio, homo nekonata alportas en hejmon, kie vegetadas maljuna paro, iom da vivoĝojo, sub paradokse funebra preteksto. La neverŝajno de la situacio — restas la enigmo: kiu

fakte estas Hanibalo kaj kial li venis ĉe Ivo kaj Marta — cedas lokon en la spirito de la spektantoj al la impresado de profunda realismo.

Tiuj du teatraĵoj estas bone luditaj de aktoroj, el kiuj elstaras Mladen Šerment (Lia Ekscelenco) kaj Fabijan Šovagović (Hanibalo). Nedubinde, ke kiam ĉiuj aktoroj pli bone regos la lingvon, ilia ludo ankoraŭ pliperfektigos.

### Eugène Ionesco: *La Leciono*

Mi ne kaŝos, ke mi atendis kun scivolo kaj iom da... angoro la prezentadon de *La Leciono* de Ionesco. Ĉio estis ŝtono de falpuŝiĝo en tiu eksperimento: la traduko, la ludmaniero kaj la reago de la publiko. Srdjan Flego multon riskis, sed li sukcesis. Al lia traduko oni riproĉos kelkajn lingvajn erarojn, el kiuj unu gravas, ĉar ripetiĝas: la uzo de *malpli* anstataŭ *minus*. Bedaŭrinde estas, ke Srdjan Flego fortranĉis interesan parton de la dialogo. La ludo de Jana Ravšelj, tre zorge studita en la Pariza teatro La Huchette (kie tiu teatraĵo estas seninterrompe ludata jam de ok jaroj), estis senriproĉa. Ĝi povus eĉ pli akcenti la karikaturecon de la gestoj, ĉefe en la komenco de la teatraĵo. La ludo de Srdjan Flego estis tre lerta, sed sentiĝis en ĝi iom da



## teritorion

de la nelacigebla Flego, kiu en la rolo de Ivan Vasileviĉ Lomov, la edziĝproponanto, anstataŭis la malsaniĝintan Longinoviĉ. Se oni adicias la tri ĉefrolojn luditajn de Srdjan Flego dum ĉi tiu kongreso, kun la tuta ŝarĝo de la reĝisorado, por jam ne paroli pri lia kontribuo al la distra vespero, oni devas miri pri lia fervora energio.

La temo de la *Edziĝpropono* estas tute simpla: karikaturado de la plurgeneracia rival-leco kaj pretendoj pri supereco de du najbaraj bienposedantoj. Kvankam bonvena estas la edziĝpeto de la unu al la filino de la alia, tamen la malnovaj kvereloj pri terposedo k.s. tuj forgesigas ĉiujn pri la celo de la vizito. Eĉ la jam ne juna filino Natalia — esprimplene rolita de Belka Beleva — preskaŭ preterlasas la unikan ŝancon de edziniĝo pro disputemo kun la najbaro. Ŝian iomete pli flegman patron bone personigis alia aktoro el la Bulgara Esperanto-Teatro: Anani Anev, kiu kun Michel Duc Goninaz prizorgis la facile-fluan tradukon. La aŭdebla ĝuo de pli ol 2000 spektantoj certe kontribuis sprone al la ĉiam pli vigla aktorado kaj metis aproban sigelon sur ĉi tiun unuan prezenton kun aktoroj de Bulgara Esperanto-Teatro kiel sekciaj anoj de Internacia Arta Teatro. Ĝi ne estu la lasta !

Gloso: batoso — ridiga efekto de kontrasto inter io grandioza kaj io malgrandioza.



improvizo. Li devus doni al la personeco de la profesoro iom pli da pezeco, al kiu devas iom post iom kontrasti la kreskanta ekscitiĝo.

La publiko videble ĝuis tiun verkon, kiun multaj tamen etiketis absurda kaj apenaŭ komprenebla. La rideksplodoj de la publiko pruvis tiun ĝuon, sed, pli profunde, la esperantistoj certe trovis konatan terenon en la karikaturado de la leciono pri lingvistiko. Ĉu absurde? "Mi konis homon, kiu prononcis familio anstataŭ familio, februaro anstataŭ februaro..." Ĉu tio nenion memorigas al vi? Sed mi lasas tiun demandon al niaj Akademianoj...

La eksperimento estas farita: Ionesco estas ludebla sur esperantista scenejo por internacia publiko. Ni esperu, ke tio instigos IAT prezenti estonte aliajn teatraĵojn de Ionesco.

M. Duc Goninaz

### Jean-Paul Sartre: *Sen Eliro*

Kiel kvaran dramon por la libervolaj vesperoj la Internacia Arta Teatro elektis *Sen Eliro* de Jean-Paul Sartre. Ĉi tiu verko estis jam prezentita en Sofio, sed antaŭ tre malgranda publiko; la nuna ripeto, kiun ĉeestis eble 300 kongresanoj, ebligis al ĝi la pli vastan konatiĝon, kiun ĝi nepre meritas. En Hago ĝi

akiris unuarangan sukceson, unue pro la enscenigo kaj aktorado, sed eble ĉefe pro tio, ke *Sen Eliro* estas dramo plena je signifo, saturita je la filozofio de Sartre. Ĝi estas komplimento al la seriozeco de la publiko.

Senelira estas la infero, kiun vorte pentris Sartre. Tri mortintoj, enfermitaj kun siaj malfortecoj kaj surteraj krimoj en ŝlositan ĉambron, nenian konsolon povas trovi por faciligi la sennoktan eternan "ekzistadon". Kiel Estelle, la murdintino de sia filino kaj kaŭzo de alia morto, Ljiljana Gener ripetis sian Sofian sukceson. Ankaŭ Srdjan Flego firmiĝis en sia rolo de fanfara malkuraĝulo. Nur Ingeborg Apelt, kiu ne aktoris en Sofio, ŝajnis iom tro rigida kaj memkonscia. Sed estas ĝuste ŝiaj vortoj, kiuj plej longe ŝvebas en la memoro kvazaŭ resumo de la tuta dramo:

*"Ĉiam tro frue oni mortas — aŭ tro malfrue. Kaj tamen la vivo staras tie, finita: streko estas metita, necesas adicii. Vi estas nur tio, kio estis via vivo."*

Feliĉe, ni havas nun la okazon tralegi en trankvilo la tre kompetentan tradukon de Roger Bernard, ĵus eldonita de Esperantaj Francaj Eldonoj.

*Srdjan Flego riproĉas al Belka Beleva en "La Edziĝpropono"*



## VOJAĜANTAJ TURTOJ

Coelho Neto

En la ĝangalo densa de mia malgajeco,  
kie ne plu nestadas ridetoj gaje tremaj,  
vivis kaj sidis kune sur branĉa rompopeco  
de la melankolio, tri turtoj karesemaj.

Tagnokte ili kveris; ĉe la vespera horo  
unu el ili tamen, per kvero triste bela  
ĉagrenon dolorigan portis al mia koro;  
ĉagrenon malprecizan — estis la plej malhela.  
La plej malgranda, blanka, blankanta kvazaŭ neĝo,  
dum la lumnoktoj ĝemis, sed ĝia voĉ' nebrua  
pli da gajec' enhavis en sia kver-arpeĝo,  
pli multe ol la voĉo ĝemanta de l' unua.

La tria, granda, forta, l'aliajn tre superis  
per la flugiloj firmaj, aŭdace eĉ tajfunon  
povanta venki fluge; ĝi tagenokte kveris  
sur branĉo, rigardante jen stelojn, jen la sunon.  
Por kunvivad' pli bona inter ni kvar, mi devis  
al ili doni nomojn: l'unua ĉagrenporta,  
fariĝis RESOPIRO; la dua turt' ricevis  
la dolĉan nomon AMO; ESPERO la plej forta.

Je iu vesperiĝo, ĉe l' taga horo lasta,  
mi prenis en la manon la turton elegian  
kaj lasis ĝin forflugi al la ĉielo vasta  
kaj same liberigis la duan kaj la trian.

Svingiĝis la flugiloj; mi vidis ilin flugi  
kaj alten suprenŝvebi en la ĉielan pacon,  
kvazaŭ la helajn grajnoj klopodus ili pluki,  
disvastigitajn juse de l' nokto en la spacon.  
Kaj ili malaperis! Aŭroris preskaŭ jam.  
Mi restis tute sola, pensanta pri l' reveno  
de miaj kurieroj. Kion reportos AM',  
la du aliaj, kion? Ĉu ĝojo aŭ ĉagreno?  
Mi fiksis la rigardon; arbore — lumjuveloj;  
laŭproportio kiel pli nigra, sennebula  
fariĝis la mallumo, aperis pli da steloj  
kaj da lampiroj, kvazaŭ de steloj bild' spegula.  
Ekstrema izoleco! Ĉar kiom ajn mi penis,  
mi ne sukcesis vidi la lumon de l' kabanoj;  
la kant' melankolia de la paŝtist' ne venis  
el supro de la monto al miaj du timpanoj.

Rigardi la ĉielon dum atendad' angora!  
Rigardi stelojn fikse! Rigardi la arbaron!  
Subite — ĝemo... alia pli dolora...  
proksime bruas io... tuŝetas mian haron...  
Mi turnis min rapide. Flirtante ĝi susuris,  
sur mian ŝultron saltis, sur mian manon poste,  
ĝemante ĉiam, ĉiam. Al hela lok' mi kuris,  
rigardi ĝin ĉe lumo. Subite estis froste.

Akompanant' eterna! En kor' por ĉiam nestas;  
ĝi for de l' kor' ne vivas. Ombro de l' viv' iama,  
fantom' de larm' kaj rido. La RESOPIR' ĝi estas,  
la sama turt' malhela — akompanant' ĉiama.

ESPER' kaj AMO pasas fojfoje apud mi,  
kelkajn momentojn restas, forflugas ĉe aŭror'.  
Nur ĝi min ne forlasas, l'unua el la tri,  
nomata RESOPIRO, la turt' de ĝema plor'!

Per tiu ĉi traduko en esperantaj aleksandroj de poemo de Coelho NETO, s-ro L. H. KNOEDT, la tradukinto de la "Elektitaj Poemoj" de Castro ALVES, unuafoje estas premiita en la Belartaj Konkursoj.

Coelho NETO (1864-1934) estis grava brazila verkisto en preskaŭ ĉiuj branĉoj de la belliteraturo. Novelo lia troviĝas en la kolekto "Antologio de Brazilaj Rakontoj".

## REZULTOJ DE BELARTAJ KONKURSOJ 1964

### Originala Poezio

1. Vesna Skaljer-Race (Jugoslavio): "Adiaŭo";
2. Vesna Skaljer-Race: "Ĉemare";
3. (tri egalaj)  
Vesna Skaljer-Race: "Forto";  
Julio Varga (Hungarujo): "Tajpistino";  
Alvaro de Orriols (Francujo): "La ondoj";

### Tradukita Poezio

1. Leopoldo Henrique Knoedt (Brazilo): "Vojagantaj turtoj" ("Pombos viajantes") de Coelho Neto (1864-1934);
  2. Claude Piron (Svislando): "Noktopensoj" de la ĉina poeto Li Po (m. 762 p.K.);
  3. Julio Varga (Hungarujo): "Aŭtuna Kanto" ("Chanson d'automne") de la franca poeto Paul Verlaine (1844-1896);
- Honoraj mencioj:
4. Henry Fridén (Norvegujo): "Sur Tingvellir" ("På Tingvellir") de Nordahl Grieg;
  5. Julius Balbin (Usono): "Ĝisene" de la rusa poeto Boris Pasternak (1890-1960);

### Originala Prozo

1. Albert Samyn (Belgujo): "La karnavalo de la fantazio" eseo;
  2. Andro Szabó (Hungarujo): "Nur hundo";
  3. L. L. Tadolini (Italujo): "Jozefo kaj la montaro", novelo;
- Honoraj mencioj:
4. Claude Piron (Svislando): "La forjeto";
  5. Andro Szabó (Hungarujo): "Nur antaŭen";

### Originala Dramo

1. A. Put (Nederlando): "Sonbildo laŭ la vivo de D-ro Zamenhof";

### Premio "Nova Talento"

W. A. Verloren van Themaat (Nederlando): "Nekrologo de Esperanto".

## ALIAJ PREMIOJ ALJUĜITAJ

### Arĝenta Sprono de KoKo

Baldur Ragnarsson (Islando) pro la originala poemaro "Ŝtupoj sen nomo" kaj la traduko de "Sub stelo rigida" de Thorsteinn frá Hamri.

### Oratora Konkurso

1. Aŝvini-Kumar' (Hindujo) pri "Juna sciencisto antaŭ lingvaj baroj";
  2. Eliza Weide (Germanujo) pri "La rolo de Esperanto en la lerneja programo";
  3. Francisko Simonnet (Francujo) pri "Ĉu la latina kaj greka lingvoj necesas en la lernejo kaj universitato?";
- Konsolpremio: K. Kordylewski (Pollando).



## Foto-konkurso

**konkurs-  
rezultoj**

Premio Gevaert (400,— gld. plus medalo): Juhász Miklos (Hungarujo); Ekstra Premio Gevaert Junulara (aĝlimo 26 jaroj — 200,— gld. plus medalo): Imre Gschwind (Hungarujo); 1-a premio (150,— gld.): Miroslav Rybáček (Ĉeĥoslovakio); 2-a premio (100,— gld.): Vásáry János (Hungarujo); 3-a premio (50,— gld.): L. J. P. de Waal (Nederlando).

**Premio  
Gevaert:  
Juhász  
Miklos  
(Hungarujo)**





# Triobla venko por serba poetino

## Belartaj Konkursoj

La nunjaraj konkursoj estis la 15-a okazigo en la serio komencita en 1950. Kiel en la pasinta jaro, la branĉo kongreslanda estis ellasita, sed kvin aliaj branĉoj funkciis laŭkutime. La premioj konsistis el 100,- gld. por unua premio en ĉiu branĉo, 70,- gld. por la dua premio, kaj 40,- por la tria. Krome, 70,- gld. estas asignitaj al la "Nova Talento".

En bone ĉeestita kunveno Prof. Gaston Waringhien, kiel membro de la prijuĝa komisiono, anoncis al la kongresanoj la rezultojn de la konkursoj. (Vidu p. 150). Verŝajne senprecedenca estas la rezulto de la branĉo Originala Poezio, en kiu la triobla venko de Vesna Skaljer-Race, kiu mem deklamis siajn premiitajn verkojn, meritis la fortajn aplaŭdojn. Tute novaj premiitoj estas Julio Varga, Leopoldo Knoedt (tradukinto de la poemoj de Castro Alves), D-ro Luigi Tadolini kaj S-ro A. Put, krom ankaŭ la "nova talento" D-ro Verloren van Themaat. Entute la nombro de premiitoj en la historio de la konkursoj per tio altiĝis al 72 el 21 landoj.

Prof. Waringhien regalis la ĉeestantojn per sia deklamo de la traduko de Knoedt en la branĉo Tradukita Poezio, kaj Roger Bernard talente interpretis la novelon de Andreo Szabó: "Nur hundo".

## Arĝenta Sprono de Eldonejo KoKo

En la sama kunveno S-ro Ib Schleicher, reprezentanto de la eldonejo KoKo, prezentis la celon de la premio, kiu estas donata, principe ĉiujare, prefere ne al iu jam firme establita verkisto, sed al iu, kiu povas profiti el tia "spronado". Ĉijare la eldonejo elektis la islandan poeton Baldur Ragnarsson, unuavice pro lia originala poemaro "Ŝtupoj sen nomo" (1960) sed ankaŭ pro lia ĉijare eldonita traduko de islanda poemaro "Sub stelo rigida". La elekton motivis Marjorie Boulton. Ŝi bedaŭris, ke "en nia ankoraŭ minoritata movado ni devas ofte akcepti multon, kion oni ne volonte akceptus en nacia lingvo." Des pli ĝojige estas, ŝi diris, honori tiamaniere unu el la malmultaj esperantaj verkistoj, kiuj montras parencecon kun la ĉeftrajtoj de la moderna nacilingva literaturo.

## Oratora Konkurso

Kiel en Sofio, tiel ankaŭ en Hago la Oratora Konkurso estis ĝojige sukcesa, kio aŭguras bone por la estonteco. Sep gejunuloj ĉijare sin anoncis: Aŝvini-Kumar' (Hindujo), Jonathan Hamilton (Britujo), K. Kordylewski (Pollando), J. P. Vilhelm kaj Francisko Simonnet (Francujo), f-ino Eliza Weide (Germanujo) kaj Ibrahim Tambura (Malio). La detalajn rezultojn vidu sur p. 151. La prijuĝa komisiono — s-roj Carlo Minnaja, Günther Becker kaj S. Pragano — trovis la elekton aparte malfacila pro la ĝenerale alta nivelo, precipe

rilate la lingvon. Ili tamen post longa debato inter si aljuĝis la unuan premion (150,- gld.) al juna hinda studento pri matematiko, s-ro Aŝvini-Kumar', kiu eklernis Esperanton kiel studento en Nederlando.

La venkinto, kiu elektis la temon "Juna sciencisto antaŭ lingvaj baroj", priparolis la ĝeneralan lingvan problemon en la scienco, sed dediĉis specialan atenton al la influo de la lingvo-strukturo sur la racian pensadon. Li komparis Esperanton kun la nederlanda, angla kaj hindia lingvoj, kaj konkludis, ke ĝi plej bone adaptiĝas al matematika rezonado. Ankaŭ en sia oratorado mem, la venkinto abunde evidentigis la flekseblecon de la lingvo. Lia parolo fluis nature kun modele klara prononco kaj verva (eble foje iomete tro verva) gestado.

Eliza Weide, kiu per bone elpensita diskurseto atingis la duan premion (100 gld.) perdis poentojn pro uzado de kelkaj nesesperantaj parolsonoj kaj verŝajne ankaŭ pro manko de gestoj. Al la tria premiito, Francisko Simonnet, oni povus riproĉi, ke la gestado ne ĉiam perfekte akordiĝis kun la vortoj. Lia profunde sonora voĉo emas iom malklarigi la konsonantojn.

La nomo de la unua premiito estos engravurita apud tiuj de antaŭaj venkintoj sur la arĝentan pokalon "Ivo Lapenna". Tiu ĉi konkurso fariĝis ege ŝatata de la kongresa publiko, kiu en Hago superplenigis la grandan salonon.

## Libro de la Jaro

En la nuna jaro ne estis anoncita la premio de la Londona Esperanto-Studo-Klubo.

## Foto-Konkurso

La juĝantaro havis la taskon elekti el 259 fotoj de 52 partoprenantoj (pasintjare nur 82 de 19 konkursantoj) tiujn, kiuj plej trafe tuŝis la temon "Freneze mi amas la naturon, ĉu nur pro tio ke dum longa tempo mi ne povis elŝovi la nazon eksteren" el la Taglibro de Anne Frank. Krom la originaleco kaj foto-tekniko ankaŭ la plej bona esprimo de la temo ludis tre gravan rolon, kaj precipe pro la lasta kriterio la juĝantaro havis tre malfacilan taskon, ĉar tre multaj konkursintoj ne tuŝis per la fotoj la temon. Finfine la juĝantoj unuanime sukcesis elekti la premiotajn verkojn, kiuj aperis ekspozicie en la 49-a UK kaj en la 20-a IJK de TEJO en Amsterdam. Ili krome aperos en la revuoj "Esperanto", "Monda Kulturo" kaj "Kontakto".

Sur la antaŭa paĝo ni publikigas la detalajn rezultojn kaj la foton, kiu gajnis la ĉefan premion (premio Gevaert). Apartan laŭdon meritas s-ro Miroslav Rybáček, premiita ankaŭ en la pasintjara konkurso. Kaj nepre gratulindaj estas la hungaraj konkursintoj, kiuj kune ricevis ĉi-jare tri premiojn, kaj ankaŭ en la pasinta jaro forportis la unuan premion.



# Aliaj kongresaj aranĝoj

**Distra Vespero**, en la granda halo Dierentuin, sukcesis forgesigi pli ol 2000 kongresanojn pri la ekstera pluvego. En varia programo elstaris sprita kanzonado laŭ franca stilo de Srdjan Flego, kaj la trifoja apero de kariba kantistino Milly Scott, konata pro siaj modernaj interpretoj de negraj religiaj kantoj. Ŝia ĵazeca modulado de la esperantaj tradukoj (de Harry Holmes) kun tre kompetenta skatado\* — precipe en la rapidigita "Oldul' rivero" — komunikis grandan vervon, kaj laŭ la longaj kaj laŭtaj aplaŭdoj oni povas esperi kontentigan merkaton por ŝiaj esperantaj diskoj, en kiuj la kelkaj malglataĵoj de ŝia prezento estus forigitaj. Pro malsano tre bedaŭrinde ne povis aperi Undine von Medway.

**La Nederlanda Matineo**, kun nederlandlingvaj popolkantoj kaj popolaj dancoj, allogis tiom da spektantoj, ke necesis duafoja prezento ekster la anoncita programo.

**Filmoj** estis plurfoje rigardeblaj. La unua drama filmo en Esperanto, "Angoroj", distribuita sub aŭspicio de UEA, turniĝis kvinfoje, ĉiam antaŭ plenplena salono. La aŭditaj opinioj estis tre diversaj, sed ĝenerale regis la konkludo, ke ĉi tiu unua provo sufiĉe sukcesis por esperigi pri la estonteco. Cetere vidu la recenzon sur p. 134 (julia "Esp."). Krome estis videblaj la kongresa filmo el Sofio kaj pluraj senparolaj informaj filmoj.

**La 9-a Internacia Infana Kongreseto** okazis dum la tuta semajno paralele kun la "plenaĝula" kongreso. Partoprenis 70 infanoj el 13 nacioj (19 el Britujo) krom gvidantoj kaj helpantoj, kies streĉa laboro sub gvido de s-inoj van Dalsem kaj Woessink meritas apartan dankon. Okazis reciprokaj vizitoj: 150 gepatroj kaj instruistoj vizitis la infanojn kaj ties ekspozicion de infandesegnaĵoj, kaj en alia tago la infanoj vizitis la Hagan kongresejon por prezenti antaŭ 400 kongresanoj varian programon de kantoj, deklamaĵoj kaj teatraĵetoj. Bedaŭrinde ankoraŭ kelkaj gepatroj ŝajne ne komprenis, ke oni nepre ne sendu al Infana Kongreseto infanojn, kiuj ne parolas flue Esperanton. Tio estas unuavice tre malagrabla sperto por la koncerna infano, kiu sin trovas tute izolita, kaj due ĝi tre ĝenas la organizadon.

**La 34-a Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj** okazis en konferencejo Overvoorde kun 160 partoprenantoj el 16 landoj. En ĝia kadro okazis ankaŭ la jarkunveno de Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj. En la programo estis prelegoj pri "Kultura vivo de blinduloj en Hungarujo" kaj "Evoluo kaj problemoj de la brajla muzikskribo", arta vespero kaj ekskursoj.

\* *Skati*: improvize kanti laŭ ĵaza stilo per sensignifaj silaboj.

**Oficiala Akcepto** aranĝita de la Nederlanda Registaro kaj la Urbestaro de Hago plenigis per amika babilado plurajn salonojn de Ridderzaal, la parlamentejo. Krome okazis akcepto de la Urbestro de Rotterdam por la ekskursintoj al la Delto-laboroj, ĉe kiu prof. Lapenna parolis danke al la bonvenigo de la Urbestro.

*Superrigardo de la Oficiala Akcepto en la Parlamentejo*



**La tradiciaj kongresaj aranĝoj** inkluzivis taŭge aranĝitan Interkonan Vesperon, komunan fotiĝon, la Cseh-seminaron, kiu ĉiujare kreas novajn kaj pli spertajn instruistojn de Esperanto, la Junularan Vesperon, la tuttagajn ekskursojn (ege sukcesaj, interalie pro perfekta vetero), Protestantan kaj Katolikan Diservojn (en la lasta predikis L. Thalmaier pri la universaleco de la eklezio), kaj la Oficialajn Bankedon kaj Balon.



# Fino de la Kvardek-naŭa

## La Solena Fermo

Sabaton, la 8-an de aŭgusto, la prezida martelo transiris el la manoj de s-ro H. W. Holmes en tiujn de prof. I. Lapenna, kaj forfrapis la lastajn momentojn de tiu ĉi 49-a Universala Kongreso de Esperanto. Kaj per la solena prezento de la kongresa flago al s-ino Isobe el Tokio, la movado jam turnis siajn okulojn anticipe al la 50-a jubilea Kongreso en Japanujo. En diversaj rilatoj la du laste okazintaj Universalaj Kongresoj tiel klare evidentigis la daŭran fortikiĝon de la Internacia Lingvo, ke oni povas kun plena fido rigardi la unuan paŝon de la Kongresoj sur azian teron.

Post enkondukaj rimarkoj de s-ro Holmes, prof. G. Waringhien anoncis la premiitojn kaj disdonis diplomojn de la Belartaj Konkursoj, kaj proklamis Baldur Ragnarsson kiel Aŭtoron de la Jaro. D-ro Carlo Minnaja, prezidinto de la juĝkomisiono pri la Oratora Konkurso, klarigis, ke la komisiono sin trovis en granda embaraso por elekti la premiitojn, sed fine aljuĝis la unuan premion al s-ro Aŝvini-kumar', kiu rikoltis longan aplaŭdon.

Raportante al la Pleno la dumkongresajn laborojn de la Estraro, Komitato kaj Sekcioj, prof. Lapenna menciis la aparte utilajn diskutojn, kiuj sekvis la sekciajn referaĵojn, kaj laŭdis ankaŭ la bonan laboron de la komitataj komisionoj. La komisiono pri la Jaro de Internacia Kunlaboro (JIK) rekomendis, ke la tuta movado apliku unu solan, simplan sloganon por la agado dum 1965: "Jaro de Internacia

Kunlaboro — Jaro de la Internacia Lingvo Esperanto".

Venis nun la vico de s-ro Holmes, anonci la elekton de la nova Prezidanto. Post la bedaŭrinda morto de prof. Yagi, la Komitato havis malfacilan taskon, trovi personon kun prestiĝo en la ekstera mondo kaj kompetenta scio pri la laboro de UEA. Tian personon ĝi tamen trovis, kaj kvankam prof. Lapenna prezentis siajn personajn motivojn por ne akcepti la prezidantecon, la Komitato insiste pledis, kaj fine li akceptis. Je tiu ĉi sciigo, la salono stare aklamis la novan Prezidanton.

Dankinte pro la kortuŝaj aplaŭdoj, prof. Lapenna priskribis la konsiston de la nova Estraro. Denove la tuta ĉeestantaro leviĝis por saluti la novan Honoran Prezidanton, s-ro Holmes, kiun elektis unuanime la nova Komitato. Kiel iama prezidanto de la Londona Esperanto-Klubo, iama estrarano de BEA, kaj ankoraŭ nun ĝia konsilano, li pruvis sian valoron en la landa movado. Krome, enirinte la Estraron de UEA sub prof. Canuto, li dufoje devis transpreni la funkciojn de prezidanto pro la forpasoj de prof. Canuto kaj Yagi. En la krizo, kiun trapasis UEA en 1955, nur la konsiderinda sumo prunte donita de ges-roj Holmes ebligis al la Asocio daŭrigi sian laboron. Dum tondra aplaŭdo li transdonis al ili bukedojn de ruĝaj rozoj.

La Ferma Kunsido poste akceptis per aplaŭdo kiel Kongresan Rezolucion la tekston de la Propono, prezentota al Unuiĝintaj Nacioj:

### kongresa rezolucio

La 49-a Universala Kongreso de Esperanto, konsistanta el 2512 reprezentantoj de 43 landoj; donante plenan apogon al la klopodoj de Unuiĝintaj Nacioj progresigi la kunlaboradon inter la popoloj kun la celo dispeli internaciajn tensiojn kaj firmigi la mondan pacon; sed profunde konvinkita, ke la lingvodiverseco prezentas unu el la plej gravaj obstakloj al plua intensigo kaj vastigo de internacia kooperado sur ĉiuj niveloj; prenante en konsideron la Rezolucion de la 10-a de decembro 1954 per kiu la Ĝenerala Konferenco de Unesko rekonis "la rezultojn atingitajn per Esperanto sur la kampo de internaciaj intelektaj interŝanĝoj kaj por la proksimigo de la popoloj de la mondo";

nun proponas, ke Unuiĝintaj Nacioj solvu la lingvan problemon per efektiva kaj efika helpo al disvastigo de la neŭtrala Internacia Lingvo Esperanto, rekomendante ankaŭ al la Ŝtatoj-Membroj progresigi ĝian instruadon kaj stimuli ĝian uzon en la internaciaj rilatoj de la popoloj.

Prof. Lapenna urĝe alvokis al ĉiuj esperantistoj tra la tuta mondo, persiste kolekti milojn da subskriboj por tiu ĉi propono al U.N.

Antaŭ ol danki, nome de ĉiuj kongresanoj, al la membroj de LKK, s-ro Holmes esprimis personan dankon pro la emocia ovacio, kaj deklaris sian firman intencon, ne ripozi "sur la breto", sed plulabori por meriti la ricevitan honoron. Nun venis la momento por pliaj bukedoj kaj donacoj — por LKK, kiu tiel bone plenumis sian pezan taskon. Specialajn aplaŭdojn ricevis s-ro Isbrucker ("En la historio de la movado lia nomo ĉiam reaperas"), s-ino Kervers, vic-prezidantino de LKK, kaj la KKS, s-ro Pompilio.

Transpreninte la prezidan martelon, prof.

Lapenna dankis unue al ĉiuj antaŭaj Prezidantoj, vivantaj kaj forpasintaj, sub kiuj li servis kiel estrarano: generalo Bastien, s-ro Malmgren, prof. Canuto, prof. Yagi kaj s-ro Holmes. Kune ili multon atingis kaj altigis la prestiĝon de la Asocio. Al f-ino Vermaas, "la motoro de la Centra Oficejo" li esprimis per bukedo sian ŝaton kaj estimon. Fine li rimarkigis, ke en la Universalaj Kongresoj ni trovas nian forton kaj unuecon. Estu tiuj samaj fortoj kaj unueco, kiuj regu nian laboron dum la tuta jaro. Jam ni atingis verajn miraklojn. Plena unueco garantias ankoraŭ pli efikajn rezultojn. "Mi alvokas per malfermita koro al ĉiuj esperantistoj" — tiel finis prof. Lapenna — "kunlabori al la venko."



## Margenaj notoj pri la Universala Kongreso

**La Akademio**, kies elektoj okazis nelonge antaŭ la Kongreso, kunsidis private. Novaj akademianoj estas s-roj Atanasov, Auld, Bernard, s-ino Conterno, s-roj Downes, Gregor, Obruĉev kaj Sevak. El la antaŭa listo nur unu (s-ro Scherer) ne reelektiĝis. Plenaj informoj pri la Akademio aperos en la Jarlibro de UEA, Dua Parto.

**La Kongresa Gazetara Servo** eldonis ĉiutagan bultenon en Esperanto kaj aliajn en la nederlanda lingvo. Inter la 1-a kaj la 10-a de aŭgusto aperis en 12 nederlandaj gazetoj 58 informoj kaj 7 artikoloj pri la Kongreso. Dum la tuta prepara periodo, ekde la 5-a de marto 1964 ĝis la fino de la Kongreso aperis sume 135 informoj (10 920 cm<sup>2</sup>) kaj 21 artikoloj (7 163 cm<sup>2</sup>) en 65 gazetoj de Nederlando. Ankaŭ alilande estis multaj reeĥoj: en norda Francujo, ekzemple, 3 ĵurnaloj raportis ĉiutage dum la kongresa semajno. La esperantaj elsendoj de Pola Radio daŭre reaŭdigis la ĉefajn okazaĵojn kun nur kelkhora prokrasto.

**Novaj eldonaĵoj**, kiel kutime, aperis abunde okaze de la UK. Aparte notindaj estis la novaj eldonaĵoj aŭ kuneldonaĵoj de UEA: la 15-minuta disko "Internacia Elparolo" kaj la kolora foto-libro "Nederlando". La disko, kun legaĵoj de kvin divers-nacianoj kiuj ĉiutage uzas la Internacian Lingvon, signas novan elpaŝon de UEA en la sferon de malmultekostaj (1,50 gld.), nerompeblaj gramofondiskoj. Post nelonge aperos simila disketo kun bonkvalite registritaj salutparoladoj el la 49-a UK. La libro "Nederlando", eldonita en sama stilo kiel "Infanoj ne konas limojn", sed kun koloraj fotoj, estis rapide aĉetata kiel memoraĵo aŭ donaco.

**La Kongresejo** per siaj belaj modernaj salonoj kun akustikaj helpiloj kontentigis ĉiujn. La solan malavantaĝon — la mallargajn koridorojn — plejparte kompensis la zorgaj antaŭkalkuloj de la KKS, kiu aranĝis laŭeble, ke ĉiuj kunvenoj finiĝu samtempe. En diversaj lokoj staris standoj de Philips, de Nov-Zelando, de la Tokia Kongreso, de florentrepreno fleurop k.a.

**La Kongresanoj** venis el ĉiuj kontinentoj. Aparte grandaj grupoj sukcesis alvojaĝi el orienteŭropaj landoj, precipe el Bulgarujo kaj Hungarujo, kaj en la dekdio da sovetaĵ reprezentantoj troviĝis la novaj akademianoj profesoroj Obruĉev kaj Sevak. Ankaŭ el aziaj landoj ne mankis reprezentantoj: forta grupeto el Japanujo, oficiala delegacio el Pekino, kaj individuoj el Hindujo, Indonezio kaj Tajlando.

**La Propono al Unuiĝintaj Nacioj** estis aldona al la kongresaj dokumentoj, por ke ankaŭ ĉiu kongresano povu poste kolekti subskribojn. Jam ĝis la mezo de aŭgusto alvenis en la C.O. preskaŭ dumil subskriboj individuaj.



**Pri la Internacia Junulara Kongreso** de TEJO en Amsterdam, al kiu aliĝis ĉirkaŭ 200 junuloj el 23 landoj, raporto aperos en la oktobra "Esperanto".

*Azi-afrika solidareco... s-ino Isobe (LKK Tokio) kaj s-ro Tambura (Malio)*

**La Universala Ekspozicio** de Esperanto bedaŭrinde, pro manko de taŭga ejo kaj de sufiĉaj lokaj organizantoj, ne povis okazi en Hago.

*Sur-literatura fono renkontiĝas s-roj Cen (maldekstre, sek. de Ĉina E-Ligo) kaj Kho (Indonezio)*

**La Antaŭkongreso** en Bruselo allogis 170 partoprenantojn el 20 landoj.



**Post la kulisoj** viglas ĉiam la kongreskoboladoj. Estis kompreneble ili, kiuj aranĝis fortan pluvon post la distra vespero, al kiu la plimulto venis sen manteloj kaj sen ombreloj. Kaj oni suspektas, ke ili kaŭzis ankaŭ la frenezan serĉon pri la misliverita florbukedo — mendita por la aktoroj de IAT — kiu fine troviĝis, distribuita inter la ĉeestantoj de la virina kunveno!

**esperanto  
septembro  
1964 155**




La 49-a Universala Kongreso, laŭ sia tradicio de plena universaleco kaj neŭtraleco, servis kiel tegmento por kunvenoj de trideko da organizaĵoj de plej diversaj fakoj kaj tendencoj. El tiuj pli ol la duono jam ligis kunlaborajn kontraktojn kun UEA, dum aliaj deklaris sian intencon plifortigi siajn ligojn kun UEA aŭ plene aliĝi al ĝi. La sekvantaj notoj rilatas nur al la dumkongresaj laboroj raportitaj. Pri la tutjaraj agadoj de la organizaĵoj kunlaborantaj kun UEA, b.v. legi en la Dua Parto de la Jarlibro.

**Internacia Scienca Asocio Esperantista** okazigis diskutkunvenon kun 45 partoprenantoj kaj jarkunvenon kun 32; organizos klopodojn por aperigi pli da esperantaj artikoloj kaj resumoj en sciencaj periodaĵoj.

**Internacia Asocio de Juristoj-Esperantistoj** diskutis la koncepton de proprieto kaj ĝiajn ĉefajn limigojn en diversaj landoj. La aŭditaj raportoj pri la konceptoj itala, norvega, okcident-germana, angla, soveta kaj jugoslava estos poste eldonitaj de IAJE.

**Esperanta Sak-Ligo Internacia** okazigis rapidan turniron, kaj jarkunvenon.



Andreo Cseh alportas al sia seminario ĉiam novan energion

**Internacia Fervojista Esperantista Federacio** diskutis, kun 50 ĉeestantoj, la proponon de la svisa fervojista sindikato pri instruado de Esperanto.

**Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj** elektis novan estraron kaj akceptis aliĝon de dana sekcio kiel la 16-a sekcio de ILEI. Ĝi krome okazigis du pedagogiajn kunvenojn. En la unua prelegis al 72 personoj s-ro A. Korff (Nederlando) pri "La leĝaj eblecoj por Esperanto en Nederlando", precipe rilate la nove akceptitan leĝon pri oficiala instruado. En la dua kunveno okazis tri mallongaj prelegoj: pri fremdaj lingvoj en Nederlando, pri instruometodoj, i.a. mekanikaj helpiloj, kaj pri la lerneja sistemo en Sovetunio.

**Studenta Tutmonda Esperantista Ligo**, al kiu nun aliĝis 15 studentaj rondoj, diskutis interalie kunlaboron inter STELO kaj TEJO. En aparta diskuto studentoj el Italujo, Francujo, Pollando, Nederlando, Britujo kaj Malio priskribis la karakteron de studentaj asocioj sia-landaj.

**Universala Ligo**: 120 personoj aŭskultis paroladon de s-ro Anthony Brooke.

**Universala Medicina Esperanto-Asocio** elektis novan estraron kaj aŭskultis raportojn de d-ro Albault pri lia terminologia laboro kaj de d-ro Shinoda pri la ĵus reaperinta "Medicina Internacia Revuo".

**Veterana Esperantista Klubo** aŭdis raporton de s-ro Podkaminer el Leningrado pri la situacio de la Esperanto-movado en Sovetunio, precipe rilate lernejojn.

**Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista** aŭdis referaĵon pri la papa encikliko "Surtera paco" kaj raporton pri la IKUE-kongreso en Valencia.

**Kristana Esperantista Ligo Internacia** aŭdis raporton pri la KELI-kongreso en Lunteren (ĉeestis 130 el 8 landoj) kaj diskutis sian estontan agadon, precipe por la Jaro de Internacia Kunlaboro. S-ro Erik Carlén, kiu prezidis, faris paroladon pri la temo: "Kio estas ekumeno?"

**Kvakera Esperantista Societo** okazigis adorkunveno. Ĉeestis 20 personoj.

Krome okazis kunvenoj de jenaj organizaĵoj: Bahaana (W. von der Ley pri "Bahaismo, religio de paco"), Libersocia Rondo (W. P. Roelofs pri "Monaj premisoj por la socio, kiun ni deziras"), Independent Order of Odd Fellows, Martinus-Instituto (tri prelegoj), Int. Geografia Asocio, Int. Asocio de Esp.-istaj Eldonistoj (fondiĝis sub prezido de d-ro Régulo Pérez), Mondpaca Esp.-ista Movado, Tutmonda Esp.-ista Ĵurnalista Asocio, Asocio de Bestamiko (prelego pri vivisekcio), Esperanto-Spiritista Asocio (H. W. Holmes pri psikaj fenomenoj inkluzive de spiritkuracado), Internacio de Militrezistantoj (H. Bing pri "Internacia rolo de la pacmovado"), Ornitologia Rondo Esperantista (kune kun agrikulturistoj), Virina (E. Bász pri "La tasko de virinoj en la epoko de paca apudvivado"), Internacia Ligo de Esperantistaj Filmistoj, Int. Societo de Arkitektoj (ISAKE), Universala Kontraŭalkohola E-ista Sekcio (pri "Alkoholismo kiel mondproblemo"), Esperanto-Civito, kaj Int. Esperanto-Radio-Instituto.



## LAŬFAKE

### Astronomio

• Multobligitan revuon sur alta scienca nivelo ekeldonis nove fondita Internacia Astronomia Asocio, ĉe S-ro W. Murawski, SUPO 10425, University of Arizona, Tucson, Arizona, Usono. El la unua kajero (6 st.): "Por trovi la altecon de luna monto" kaj "La trojenaj asteroidoj".

### Filologio

• La filologia sekcio de ISAE (vidu "Esp." 1963/194) eldonis nun sian statuton, riceveblan de S-ro L. Marikin, str. Dimo h. Dimov 53, Sofio 6, Bulgarujo, kaj akceptas aliĝojn. Jam fondiĝis loka filio en Sofio.

### Literaturo

• Dua reviziita eldono de la fama "Parnasa Gvidlibro" de Kalocsay kaj Waringhien aperos en 1965 ĉe Pola Esperanto-Asocio kaj "Heroldo de Esperanto".

### Muziko

• Formiĝas "Muzika Esperanta Ligo". La adreso de la iniciata komitato: S-ro G. B. Briano, Via Saporiti N. 8-11, Genova, Ital.

### Religio

• Nova revuo ĵus aperinta, "La Vorto" portas subtitolon "revuo por intensa kristanismo laŭ la pura vorto de Dio" kaj celas diskonigi la verkojn de Jakob LORBER (1800-1864). Eld. J. Eder, Stattegg-Eichberg 13, Graz-St. Veit. Aŭstrujo.

### Transporto

• La Svisa Fervojista Sindikato en sia jara kongreso en Interlaken akceptis unuanime rezolucion pri deviga enkonduko de Esperanto en lernejoj de ĉiuj okcidenteŭropaj landoj, kaj transdonis la proponon al la Internacia Transportlaborista Federacio. Aliaj landaj organizaĵoj ligitaj al ITF devus same interveni.

## LAŬLANDE

### Ĉeĥoslovakio

• En Lanžhot la multjara Delegito de U.E.A., S-ro F. Svačina, festas sian 70-jariĝon kaj 40 jarojn da laboro por Esperanto. Li gvidis multajn kursojn voĉajn kaj skribajn.

### Ĉinujo

• Ankoraŭ unu universitato — la plej fama kaj malnova Universitato de Pekino — ekde 1964 enkondukis Esperanton kiel duan fremdan lingvon en lingvistika fakultato.

### Germanujo

• En la Universitato de Rostock (orienta Germanujo) okazis oficiala prelego de Detlev Blanke pri Esperanto kaj la lingva problemo. Trihoran diskuton partoprenis lingvosciencistoj, filozofoj kaj pedagogoj, kaj artikolo aperis en la partia universitata gazeto.

• En la insulurbo Lindau en Bodensee okazos je 3-4 oktobro aŭstra-germana-svisa renkontiĝo kun varia programo, laŭ modelo de la sukcesa pasintjara en Bregenz. Informas: O. Walder, Waldmannstr. 10, Romanshorn, Svis.

• Mendoj por la germana Besto-Kalendaro por 1965 (vidu januara "Esp." p. 13) devas atingi la eldonejon, Reinstel-Verlag, 7261 Gechingen über Calw, plej malfrue dum septembro. De la mendoj dependos la daŭrigo! Prezo: 13 st. afrankite.

### Jugoslavio

• Aperis la unua regula eldono de nova serio de "La Suda Stelo", revuo, kiu anstataŭas "Jugoslavia Esperantisto". Ĝi prezentas varian enhavon literaturan, ideologian kaj aktualajn, kun aparta paĝo por infanoj. Jarabono 30 st., 7,50 gld.

### Malto

• En ĵurnalo "La laboristo" aperis malta traduko de "La morto de Empu Sedah" el "Esperanto" de majo 1964. Tradukis Reno M. Caruana.

### Nederlando

• Sepdek-kvinjaran datrevenon festas inĝ. J. R. G. Isbrucker, esperantisto de 1909 kaj siatempa membro de la Lingva Komitato kaj Prezidinto de la Akademio. Li estis prezidanto de LKK kaj en la 12-a UK en Hago, 1920, kaj ofte reprezentis en UK-oj sian registaron.

### Pollando

• Lige kun siaj klopodoj por penetri en varsoviajn lernejojn, la Varsovia Filio de PEA okazigis 4-monatan specialan pedagogian kurson por Esperanto-instruistoj, kaj planas novan ankaŭ por 1964.

### Sovetunio

• En la kadro de la Societo de Amikeco kun Eksterlando fondiĝis Esperanto-sekcio, per kiu estos ligitaj de nun ĉiuj sovetiaj esperantistoj. En 1965 aperos unu lernolibro kaj du grandaj vortaroj.

• Se oficiala permeso estos ricevita, baldaŭ aperos nova disko kun leĝeraj modernaj kantoj de litovaj komponistoj. La kantoj — de solkantistoj, virkvarteto kaj gea kvinteto — estas registritaj kun akompano de la ĵazorkestro de Litova Radio kaj TV.

### Svisujo

• La urba biblioteko de La Chaux-de-Fonds transprenis la aranĝadon kaj administradon de la tuta libraro kaj arĥivo de Edmond Privat (1889-1962). En la salonego ĝi restarigos fidele lian hejman laborĉambron. Tiel kreiĝos "Centro Edmond Privat".

### Vjetnamio

• Renkontiĝon de pli ol 100 esperantistoj en Hanojo vizitis reprezentantoj de la Vjetnama Packomitato, Solidareca Azi-afrika Komitato, kaj Patrolanda Fronto. En 1964 aperos nova eldono de unuagrada lernilo.



Inĝ. J. R. G. Isbrucker  
prezidinto de LKK en  
la ĵus okazinta 49-a  
Universala Kongreso.  
(vidu "Nederlando")



*Informojn pri radio sendu al S-ro G. Larg-  
lantier, 29 Bd. Murat, PARIS 16, Francujo.  
Por pliaj detaloj vidu la julian numeron.*

**Pola Radio** en Varsovio, de aprilo 1959, ĉiutage disaŭdigas esperantlingvan programon dum duona horo. La pritraktataj temoj estas jene aranĝitaj: lunde, felietono pri politika, socia, ekonomia, kultura, scienca aŭ priesperanta temo; marde, "Kultura notlibro" aŭ prezentado de polaj muziko kaj muzikistoj, kaj krome ĉiun unuan mardon de la monato "Anguleto de blinduloj"; merkrede, felietono "Pri kio oni parolas en Pollando", koncerto kun bondeziroj, kaj krome ĉiun trian merkredon de la monato "Radia Film-magazino"; jaŭde, komentario pri internaciaj temoj, leterkesto, kaj la trian jaŭdon de la monato anonco de rezultoj de la konstanta konkurso por plej interesa letero; vendrede, literatura rubriko; sabate, sonigitaj raportoj pri pollandaj okazintaĵoj en la semajno; dimanĉe, panoramo de internaciaj eventoj, esperantista magazino, esperantaj kanzonoj kaj humoraĵoj. Krome, ĉiutage, novaĵoj el Pollando kaj el la mondo.

Ciuj raportoj, sugestoj, kritikoj estos plezure akceptataj de Pola Radio, Esperantaj disaŭdigoj, Warszawa, Pollando.

**Radio Roma.** 1-IX, Tra la literaturo; 4-IX, La festo de Piedigrotta en Napolo; 8-IX, Novaĵoj el Italujo; 11-IX, La dudekjara ekzilo de Dante; 15-IX, Italaj kanzonoj en Esperanto; 18-IX, Mistikaj italaj urboj: Loreto; 22-IX, Leterkesto; 25-IX, La itala poemo "La tomboj" de Ugo Foscolo; 29-IX, Kristana mondo; 2-X, Italaj sanktejoj: Pompei; 6-X, Tra la literaturo; 9-X, La urbo de Palladio: Vicenza; 13-X, Novaĵoj el Italujo; 16-X "Esperanta Ligilo" 60-jara; 20-X, Italaj kanzonoj en Esperanto; 23-X, Religia poezio: Jacopone da Todi; 27-X, Leterkesto; 30-X, Italaj turismaj urboj: Spoleto. Krome, ĉiun merkredon: Kuriero de Esperanto. Prelegantoj: S-ro Luigi Minnaja (marde kaj merkrede) kaj Prof. D-ro Vincenzo Musella (vendrede).

**Radio Praha.** 24-IX, Novaĵoj el Esperantorondetoj. Proponoj kaj sugestoj por la venontaj elsendoj estos atente studataj. Skribu al Radio Praha, Disaŭdigo por Aŭstrio, Esperanto-elsendo, Ĉeĥoslovakujo.

## nekrologoj

### ANTON PODREPSCHEK

Kvardek-sesjara forpasis en Graz post dujara malsano S-ro A. Podrepschek, Delegito de UEA de post 1947. La morto okazis je 11.4.64.

### NILS GUSTAFSON (1906-1964)

En Hällabrottet, Svedujo, mortis la 17-an de julio Nils Gustafson, vic-delegito kaj DM de UEA. Malgraŭ malsano li estis ĉiam optimisma, kaj ĉiam preta gvidi kursojn.

## ricevitaj eldonaĵoj

**Die Weltsprache Esperanto** (La monda lingvo E-o) de Hermann WAGNER. Eld. turistasocio "La Naturamiko", 7 Stuttgart-Untertürkheim, Grossglocknerstr. 28, Germanujo. 55 p. 20 × 15 cm. Prezo: 1,— gm. Informbroŝuro.

**Esperanto?** Eldiroj de eminentaj polaj intelektuloj. Red. W. WŁODARCZYK. Eld. PEA, Varsovio, 1964. 151 p. 20 × 14 cm., il. 4250 ekz. Prezo: 2,25 gld.\* Paralelaj tekstoj pola kaj esperanta.

**Moderne Menschen sprechen Esperanto** (Modernaj homoj parolas Esperanton). Eld. Germana E-Asocio, Nürnberg, 1964. 38 p. 21 × 15 cm., il. Varba broŝuro.

**Gustigoj kaj komentoj al la Radio-terminaro.** Unu folio ricevebla de Esperanto-Press, Cardiff, Ont., Kanado.

**Aŝma, versa rakonto tradicia.** El la sania trad. Popola Kultura Trupo, Junnan-provinco; el la hana trad. LAŬLUM. Eld. Ĉina Esperanto-Ligo, Pekino, 1964. 79 p. 18 × 16 cm., bind. Kun 9 kolorilustraĵoj. Prezo: 2,65 gld. (10,6 st).\*

**La mortiganto kaj La naskotago de la principeto,** legolibretoj por komencantoj, multobl., eld. Lernejo Egerton Park, Denton, Manchester, Britujo.

**La vulpo.** Eld. Ĉina Esperanto-Ligo, Pekino, 1964. 16 p., 19 × 14 cm. Kolorpresita infanlibreto. Prezo: 0,40 gld. (1,6 st).\*

**Pedagogiko, didaktiko, metodiko, psikologio** de J. ČERNÝ. 1964. 21 p. 30 × 20 cm., mult. Paralelaj tekstoj Esperanta kaj ĉeĥa.

**Katolika Terminaro Esperanto-latina,** de WANNEMAKERS kaj HUBERTENO. Internacia Katolika Informejo, Tilburg, 1964. Dua korektita eldono. Vidu "Esp." 1963, p. 214.

**60 ans d'Espéranto à Liège** (60 jaroj de Esperanto en Liège), de J. PIRARD. Eld. Lieĝa Esp-ista Grupo, 1964. 16 p. 22 × 14 cm. France.

**Valencio.** Eld. Soc. Valenciana Fomento del Turismo, Bajos del Ayuntamiento, Valencia, Hispanujo. Turisma il. faldfolio.

**La ora hakilo.** Eld. Ĉina Esperanto-Ligo, Pekino, 1964. 12 p., 25 × 21 cm. Kolorpresita infanlibreto. Prezo: 0,80 gld.\*

**Terminaro de elektraĵoj kaj transformiloj.** Esperanta anekso al grupo 10 de la vortaro de IEC. Rekomendo de ISAE. Eld. TC de ISAE, Am Etzerschlössel 15, 824 Berchtesgaden-Gern, Germanujo; 1964. 16 p., 30 × 21 cm., multobligita.

**Vieno invitas vin.** Plurkolora faldfolio eld. Fremdenverkehrsstelle der Stadt Wien, I, Stadiongasse 6-8.

**Plena Gramatiko de Esperanto, Vol. II,** de K. KALOCSAY kaj G. WARINGHIEN. Tria eld., Esperanto-Propaganda Centro, Milano, 1964. 176 p. 22 × 15 cm. Prezo: 11,10 gld. (44,40).\*

**Elektitaj poemoj** de To HUU. Elvjetnamigis Dao anh KHA. Fremdlingva eldonejo, Hanojo, 1964. 228 p. 19 × 13 cm., il.

**Esperanto en la feriejojn,** de H. BEHRMANN. Eld. E-klubo, 303 Walsrode, Memelstr. 14, Germ. 16 p., 30 × 21 cm. multobligita. Prezo: 2 rpk. Gvidilo por feriaj kursoj.



**La gvidantoj de KPSU estas la plej grandaj splitistoj de nia tempo.** Fremdlingva Eld. Pekino, 1964. 60 p. 18 × 13 cm. Prezo: 0,55 gld.\*

**Nederlando** de Jaap ROMIJN kaj Kees SCHERER. Eld. Bruna, Utrecht, 1964. 104 p. 17 × 11 cm. Kolorpresita fotolibro. Prezo: 3,50 gld. (14 st.).\*

**Enciklopedieto Japano**, de T. NAKAMURA. Eld. Kosmo, Osaka, 1964. 217 p. 21 × 15 cm., tolbindita kun kartona skatolo, kun 80 fotoj.

**Bill kaj lazuraj okuloj**, de Atus GOLDONI kaj Lina GABRIELLI. Eld. la verkintoj, Ascoli Piceno 1964. 82 p. 21 × 16 cm. Rakonto.

**Vortaro Esperanta-Vjetnama.** Red. E-Klubo de Hanojo. Eld. 1960. 318 p. 19 × 13 cm., bind. **Duagrada Esperanto-kurso**, de Nguyễn Công MÔN kaj Truong Quang ĐÊ reviziis Đào anh KHA. Eld. 1963. 255 p. 19 × 13 cm.

**Internacia Elparolo.** Eld. UEA, Rotterdam, 1964. Disko 18 cm diam., 33<sup>1</sup>/<sub>3</sub> r.m., daŭro 15 minutoj. Legaĵoj. Prezo: 1,50 gld.\* (6 st.).

**F-ino Brasiketo kaj S-ro Jan**, rakonto de C. T. CHANG. Eld. la aŭtoro, Tajvano, Ĉinujo, 1964. 12 p. 20 × 14 cm., ofsetita.

**Zwolle en unu horo.** Eld. V.V.V., Zwolle, Nederlando, 1964. Turisma broŝuro.

**Faktoj pri Nederlando.** Eld. 1964. 48 p. 20 × 11 cm., ilustrita.

**Nia historio**, de H. A. DE HOOG. Eld. Kristana Esperantista Ligo Internacia, 1964. 159 p. 18 × 13 cm. Prezoj: bind. 5,50 gld. (22 st); broŝ. 4,50 gld. (18 st).\*

**Esperanto - enkonduka libro.** Eld. Esperanto Services, 85 Sparks St., Ottawa 4, Kanado. 12 p. 16 × 10 cm. Angla-franca broŝureto.

**Hungario invitas vin.** Eld. IBUSZ, Budapest V, ker., Felszabadulástér 5, Hungarujo. 16 p. 20 × 14 cm., il.

**Fiat 850 — aŭto plej aktuala.** Kolorpresita komerca broŝuro.

**Plano de Antverpeno.** Eld. Servo por Turismo, Pelikaanstr. 6, Antverpeno, Belgujo, 1963.

**Elektitaj versaĵoj** de Miĥail LERMONTOV. Diversaj tradukintoj. Eld. Moskvo 1964. 28 p. 20 × 13 cm., ofsetita.

**Kantoj de sovetaj komponistoj.** Trad. K. GUSEV. Dua vol. Moskvo 1964. 36 p. 21 × 14 cm, ofsetita.

**ricevitaj  
eldonaĵoj**

## NOVAJ KONKURSOJ PRI LA 49-A UNIVERSALA KONGRESO!

I.L.E.F. (Internacia Ligo de Esperantistaj Foto-, Kino- kaj Magnetofono-Amatoroj), faka organizaĵo kunlaboranta kun UEA, invitas al konkurso en la jenaj tri branĉoj:

**Foto.** La plej mallonga flanko de la bildo devas esti minimume 9 cm. longa. Diapozitivaj estu muntitaj aŭ en kadroj aŭ inter vitroj 5 × 5 cm.

**Kino.** Filma larĝeco 8 mm. kaj daŭro por montrado maksimume 15 minutoj.

**Sonbendo.** Rapideco 4<sup>1</sup>/<sub>3</sub> aŭ 9<sup>1</sup>/<sub>2</sub> cm/sek., daŭro maksimume 30 minutoj.

La temo por ĉiuj branĉoj estas "La 49-a Universala Kongreso de Esperanto". Limdato 1-an de novembro 1964; premioj por la plej bonaj.

Adreso: I.L.E.F., s-ro Gunnar Ringh, Gustav Adolfsg. 30 D, SKÖVDE, Svedujo.

### DELEGITOJ

#### Argentino

Catamarca 52.000. FD (Bankaj aferoj):

S-ro E. A. Camarasa, bankoficisto, Sarmiento 139.

#### Aŭstralio

Hobart D: S-ino H. C. Cooper, dommastrino, 9 St. George's Terrace; tel. 25531.

#### Aŭstrujo

Graz D: la antaŭa VD.

Linz D: vakas.

#### Brazilo

Rio de Janeiro.

FD (Medicino): D-ro C. Doin Silva, kuracisto, Rua Riachuelo, 221, apto. 1001.

FD (Radioamatorismo): S-ro Alfredo F. C. Silva, Rua Marquês de Pombal 60 ZC 14.

#### Britujo

Crawley D & FD: vakas.

#### Bulgarujo

Kazanlik VD: S-ro D. Martinov, pensiulo, ul. Ivan Nedjalkov 1; tel. 24-38.

#### Ĉeĥoslovakio

Brno FD (Literaturo): vakas.

#### Danlando

Herning D: vakas.

#### Finnlando

Helsinki FD (Edukado): S-ino J. Pulliainen, instruistino, Porintie 9 B 20, Munkki-vuori; tel. 451 504.

Taivalkoski (Oulun lääni). 6.000.

D: F-ino S. Koivu, instruistino, Hutun koulu.

#### Francujo

Aigre (Charente). 1.200.

D: S-ro M. Massemin, korespondisto, 83 Grand'Rue.

FD (Naturismo): la D.

Aix-en-Provence FD (Lingvoj): la VD.

Luchon (Haute Garonne). 3.900.

D: S-ro F. Arrieu, komerca konsilisto, No. 6 Rue Soulerat.

Nevers D: F-ino N. Blanc, laboratoriistino, 1 rue Henri Barbusse.

**oficiala  
informilo  
n-ro 371  
1 julio 1964**

**KONGRESANO! ESTU UEA-ANO!**

**esperanto  
septembro  
1964 159**



Ruelle D & FD (Naturismo): vakas.

#### Germanujo

2800 **Bremen** JD: S-ro B. Kreykenbohm, studento, Am Randweg 41, Bremen 13.

4100 **Duisburg** FD (Fervojoj): S-ro P. Hermanns, emerito, Zur Wolfskuhl 43, 4100 Duisburg-Wedau.

5160 **Düren** (Rheinland). 50.000.

D: S-ro F. Jodozi, televidteknikisto, Köln-str. 67; tel. 2075.

FD (Televidotekniko): la D.

6750 **Kaiserslautern** FD (Medicino): vakas.

6800 **Mannheim** JD: vakas.

4050 **Moenchengladbach** FD (Muziko): vakas.

6730 **Neustadt** D: la antaŭa VD.

#### Gronlando

**Godthåb** 4.000.

D: S-ro G. Kustosz, instruisto.

#### Hungarujo

**Budapest.**

FD (Fervojoj): D-ro I. Bácskai, fervoja ĉefkonsilanto, Budapest XVII, Rhegy, Árpád fejedelem u. 28a; tel. 131-220/2.

FD (Presado): vakas.

**Pápa** D: vakas.

JD: S-ro I. Téringier, studento, Felszabadulás 8.

**Székesfehérvár** (Fejér-m.). 62.000.

FD (Turismo): S-ro L. Molnár, masaĝistopiedkuracisto, Árpád fürdő; tel. 15-64.

#### Italujo

**Bologna** VD: S-ino G. Gimelli, fervoja teknikisto, via Donato Creti 61; tel. 359071.

#### Kanado

**Montreal** FD (Astronomio): S-ro F. J. De Kinder, astronomo, 10724 Rue J. J. Gagnier, Montréal 12; tel. 388-0682.

#### Kongo

**Léopoldville** 1.250.000.

D: S-ro Karel Braet, instruisto, B.P. 7579, Léopoldville 1.

#### Nederlando

**Aalsmeer** FD (Florkulturo): vakas.

**Amstelveen** (N.H.) 54.000.

D: S-ro K. Ruig, ĉefnavigisto, Spurgeonlaan 122; tel. (02964) 18609.

**Amsterdam** FD (Sporto: ĵudo) & (Maristaj aferoj): vakas.

**Rotterdam** FD (Socia laboro): vakas.

**Vierlingsbeek** D: vakas.

#### Sovetunio

**Abja-Paluoja** D & FD (Ateismo): vakas.

**Viljandi** (Estonia S.S.R.) 20.000.\*

D: S-ro A. Mikk, bibliotekisto, str. Jakob-Soni 3-2; tel. 740.

FD (Bibliotekoj): la D.

#### LA POŝTMARKKOLEKTADO

**Grava atentigo:** Ekde la 1-a de aŭgusto la konstanta adreso, al kiu oni sendu uzitajn poŝtmarkojn por vendo favore al UEA estas jena: S-ro P. Zacho, Fredensgade 9, ESPERGAERDE, Danlando.

#### NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Boulogne, D-ro J., Aix en Provence, Francujo.  
Aŝvini-kumar', Amsterdam, Nederlando.

#### MEMBROJ-SUBTENANTOJ 1964

342. Pauluk, S-ro J., 343. Varanda, S-ro José, Brazilo; 344. Strangman, S-ro P. G., Britujo; 345. Gerwin, S-ro R., 346. Schumacher, F-ino Margarete, Germanujo; 347. Amaral, Inĝ. Hugo, Portugalujo; 348. Carrfors, S-ino Solveig, Svedujo; 349. Lewine, S-ro J. L., Usono.

#### DONACOJ AL ĜENERALA KASO

São Paulo Esperanto-Asocio: 26,60 gld.  
Jocham, S-ro Gebhard, Germanujo: 0,90 gld.  
Freitas, S-ro Manuel de, Portugalujo: 7,— gld.  
Lewine, S-ro L. J., Usono: 6,48 gld.

#### FONDAĴO CANUTO

Podlinski, S-ro Georg, Gronau, Germ.: 2,70 gld.

Al ĉiuj donacintoj plej varman dankon pro ilia granda helpo.

M. H. Vermaas,  
Direktorino C.O.

#### anoncetoj

Se vi serĉas seriozajn gekorespondantojn, ĉu individuajn, ĉu sur kolektiva bazo (ekz. por lernejo) turnu vin al la Koresponda Servo de UEA (adreso: K.S.M., 12, Rue des Jacobins, Clermont-Fd. (PdD) Francujo) kiu peras adresojn laŭ la regularo aperinta en Jarlibro

**Informojn** pri la katolika religio oni povas senpage ricevi de la Internacia Katolika Informejo, Sekretariejo: Gasthuisring 54, Tilburg, Nederlando.

**Dum decembro** venonta, la esperantistaro de Saint-Etienne festos la sesdekan datrevenon de sia asocio. Cele al organizo de manifestacio, mi petas ĉiujn klubojn k. grupojn en la tutmondo ke ili sendu saluto: leterojn, poŝtkartojn, memoraĵojn, k. t.p. Adreso: Club espérantiste, Bourse du Travail, Saint-Etienne (Loire), Francujo.

**Iu ajn virino** (libera edziniĝi) en Britujo helpu ĉesigi mian teruran solecon. Skribu al S-ro E. Semaska, 166 Tettenhall Road, Wolverhampton, Staffs.

**La sekreta potenco malantaŭ la Bataliloj.** En tiu fotopresita prelego Martinus traktas la demandon, kiu estas tiu potenco; kaj ĉu la unuopa homo povas influi ĝin, aŭ ĉu li estas senpova. (Prezo 2 int. rspk.). Petu senpagan ilustritan faldprospekton ĉe Martinus-Instituto, Mariendalsvej 94-96, Kopenhago F., Danlando.

**Germana Esperanto-Kongreso** Pentekoston 1965 Düsseldorf, Herzogstr. 79, sendas, por kvar int. respk., belafankitan leteron, 36 glumarkojn kaj esperantlingvan prospekton. **Dezir**as korespondi kun geknaboj el la tuta mondo Liza Gareva, ul. "761" No. 13/II, Skopje, Jugoslavio.

**Dezir**as korespondi magnetofonbende (rapideco 9,5 cm., dutraka) 47-jara s-ro Kurt Schut, 423 Wesel, Friedrichstr. 2, Germanujo.

**Lasta anonco** de D. Soleo en tiu ĉi revuo. Post 20 jaroj en IEL/UEA, inkluzive 5 jarojn da vana pledado por E-Civito, li daŭrigas en precipe ekstermovadaj rondoj. Plano tamen ĉiam validas. 14 B Castle Avenue, Dover, Britujo.



ESPERANTAJ - FRANCAJ - ELDONOJ

MARMANDE - Francujo

## Doktoro L. L. Zamenhof

broŝ. bind.

### FUNDAMENTO de ESPERANTO

(5-lingva - 355 paĝoj) 38 st. 50,4 st.

LINGVAJ RESPONDOJ 130 p. 23 st. 31,4 st.

HAMLETO bind. ilustr. 206 p. 40 st.

## J. P. Sartre

broŝ

### SEN ELIRO - LA RESPEKTEMA

P... 111 p.

(en traduko de Roger Bernard) 24,5 st.

Serio da DEK infanlibroj,  
kolorilustr.

28,5 st.

## Jean Bacquer

### LA KUNPRINCLANDO ANDORO

73 p. 60 fotoj 23 st.

MENDU ĉe EDITIONS FRANÇAISES  
d'ESPERANTO

11 rue Paul Vergne - MARMANDE - Francujo

Poŝtĉekkonto: 30-900 Bordeaux  
(ĉiuj prezoj afrankitaj)

# UNIVERSALA REVUO



En ĉiu numero: selektitaj artikoloj de  
la Esp. gazetaro — Recenzoj — Humo-  
raĵoj — Konstanta konkurso — Kajero  
de la Adresaro ESPERANTO-PAROLA-  
LATA, konstante reeldonata — kt.p.

Aperas provizore kvaronjare; petu  
specimenon.

Abonprezo: 12 steloj (3 gld) ĉe UEA-  
landaj perantoj, aŭ rekte ĉe la eldo-  
nanto S-o M. Rétot, 149 avenue Gam-  
betta, Paris-20: 7 rpk, aŭ 3,50 F al  
poŝta ĉekkonto Paris 1042-07.

Donaco al novabonantoj: kartona kovrilo kun

## ESPERANTO-PAROLATA

La lando de la 49-a Universala Kongreso

## „NEDERLANDO”

viviĝas sur 64 paĝoj da plenkoloraj fotoj en  
nova poŝformata libro de BRUNA, eldoninto  
de la ege sukcesa "Infanoj ne konas limojn".  
Ampleksa teksto pri la nederlandaj historio,  
arkitekturo, vivo kaj turismo.

104 p. 3,50 gld. 14 st.

Mendu ĉe la Libroservo de U.E.A. !

La plej fama verko de

## IBSEN: PEER GYNT



Drama poemo kun  
komentario kaj tri  
popolfabeloj.  
El la norvega lingvo  
tradukis E. A. Haugen.  
Prezo: bind. 8 gld.,  
broŝ. 6,30 gld.

Eldonis: ELDONA RONDO, boks 109,  
Trondheim, Norvegujo.

Mendu ĉe  
UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO  
Nwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando

## INTERNACIA ELPAROLO

per

### GRAMOFONA DISKO

Parolas kvin diversnaciaj profesiaj esperan-  
tistoj, kies ĉiutaga lingvo estas la Internacia:  
M. Sudec (Aŭstralio), M. H. Vermaas, (Neder-  
lando), G. G. Pompilio (Italujo), W. Schmid  
(Germanujo), V. Sadler (Britujo)

Aŭskultu mem kaj kontrolu vian elparolon.

Granda helpilo por kursanoj kaj  
memlernantoj.

Aĉetebla ĉe U.E.A.

Prezo: nur 1,50 ned. gld. (6 steloj)


## TUJ APEROS !

DU GRAMOFONAJ DISKOJ PRI LA  
49-a UNIVERSALA KONGRESO EN  
HAGO

Ĉiu disko daŭras 15 minutojn je rapideco  
33 $\frac{1}{3}$  r/m. Ili estas nerompeblaj kaj kostas po  
1,50 gld (6 stelojn). La disko "Salutparoladoj"  
enhavas fragmentojn el la paroladoj de  
diversnaciaj salutantoj en la Inaŭguro. La  
disko "Festparolado" enhavas preskaŭ la  
tuton de la Festparolado de prof. I. Lapenna.

Eldonas kaj disvendas UEA





# Fido al **PHILIPS** estas tutmonda.




## Venezuelo

Unu el la plej rimarkindaj industriaj atingoj de nia epoko estas la subakvaj petrolterenoj en la Lago Maracaibo Venezuelo.

Ĉi tie oni utiligas aŭtomatan telefonaparataron de Philips, en kelkaj okazoj interligitan per radia transmisio, por la interterena telefona reto – ĉirkaŭ 5000 linioj. Telefonistoj deĵorantaj sur la lago kaj en la surteraj stacioj nun povas elekti aŭtomate ĉiujn liniojn kaj la publikan reton.

Tage kaj nokte oni uzas sennombrajn, plej diversajn produktojn de Philips en la tuta mondo. Inter ili estas: lumigaj ekipaĵoj, radioaparatoj kaj televidiloj, gramofondiskoj, aparatoj por la mastromado, elektraj raziloj, elektrontuboj kaj duonkondukiloj, industria kaj sciencaj instrumentoj, telekomunika ekipaĵo, radaro, publikparolaj sistemoj, medicinaj X-radiaj instalaĵoj, kemiaj kaj farmaciaj specialproduktoj.



Inter multaj aliaj projektoj de la Brusela Monda Ekspozicio, Philips liveris la lumigajn instalaĵojn, kune kun la registra, sona kaj simultantraduka sistemoj de la ĉefa aŭditorio.

## Belgujo



Tiu ĉi impona moderna 400-lita hospitalo en Riyadh estis preskaŭ tute planita kaj ekipita de Philips, kiu ellaboris kaj liveris plej diversajn aparatojn kaj instalaĵojn por malsanulejoj en multaj diversaj landoj.

## Saŭdi-Arabio